



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Majo 2019 n-ro: 41



Merhaba,

Mayıs ayı sayımızdan okumanız için seçtiğimiz bazı önemli yazılar:

- * Nisan ayı başında İran'ın Kashan kentinde gerçekleşen 12. MONA toplantısının bir özeti.
- * Konuralp arkadaşımızın "Mühürlenmiş Zaman" adlı köşesindeki yazısı
- * Yunan mitolojisinden Ariadna'nın hikayesi
- * İspanya'nın Segovia kentindeki su kemerinin hikayesi
- * Bertold Breht'ten kısa hikayeler
- * Yavaş yavaş sona gelen Felsefe Tarihinden adlı serideki yazımız
- * Japonya'dan Ezop'un hikayelerindeki kahramanlara dair bir anlatı
- * Esperanto edebiyatına dair bir yazı
- * Kuba'dan fantastik bir masal
- * Esperanto alemine dair satirik bir hikaye
- * Bir sürü kolay okunabilecek hikaye ve şiirler

Hepinize iyi okumalar !


Saluton,

Jen la listo de niaj elektitaj artikoloj el nia maja numero por via legado:

- * Resumo de la 12-a MONA kunveno, kiu okazis en urbo Kaŝano de Irano en la komenco de aprilo
- * La artikolo de nia amiko Konuralp el lia rubriko "Tempo Sigelita"
- * La rakonto de Ariadna el la greka mitologio
- * Rakonto pri la akvodukto de urbo Segovio en Hispanio
- * Mallongaj rakontoj de Bertolt Breĥto
- * Filozofia artikolo de la filozofia serio, kiu alproksimiĝas al sia fino
- * Rakonto el Japanio pri la herooj de ezopaj rakontoj
- * Artikolo pri bildoj el la Esperanto literaturo
- * Fantasta fabelo el Kubo
- * Satira rakonto pri la Esperanto komunumo
- * Multaj facile legeblaj rakontoj kaj poemoj

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
La 12a MezOrienta kaj NordAfrika (MONA) Kunveno	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Grava festo en urbo Galabovo	4
Tempo Sigelita	5
35 jaroj de EDK	6
Terlimoj	7
ARIADNA (APIAΔNH)	8
La akvodukto historieto de Segovia, Hispanujo	10
Printempo kaj Kanto de la Akvo	11
Eventa Servo fariĝas nova servo de UEA	11
La sanktulino de iu pilgrimanto	12
La Papilio de Raleigh	14
Lertulo	16
Majo	17
Historioj pri s-ro Kojno (p.1) - Berto Breĥt	18
Mallonga Historio de Filozofio (40)	19
Ŝercoj	20
Kurcvortenigmo	20
Du rekomendindaj retejoj	20
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 12)	21
Kuiristo kaj Kato	22
El la libro de "Dao de Jing" (32)	22
Pri tio, ke la vulpo ne havas decidrajton	23
Deliro	25
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	26
Stranga Familio	27
1907: la Ido-Skismo	28
Fermi-paradokso	29
Plie pri Mez-Orienta Kunveno	29
La Martelistoj	30
Ni Lernu Esperanton!	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 9 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar.

<https://edukado.net/kursejo?kid=26934>

La 12a MezOrienta kaj NordAfrika (MONA) Kunveno de Esperanto en Kaŝano, Irano, 28-31 de marto 2019

Sukcese okazis la 12-a MONA Kunveno en Kaŝano, Irano. Vi povas legi pri la kunveno ĉe:

<https://monainformado.wordpress.com/2019/04/04/la-12-a-mezorienta-kaj-nordafrika-mona-kunveno-de-esperanto-en-kasano-irano/>

kaj ĉe : <https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/plie-pri-la-mez-orienta-kunveno/>

kaj ankaŭ en la maja Esperanto Revuo

Eventoj

Esperanto junas kaj azias: Pri la 12-a Mezorianta Kunveno en Kaŝano, Irano

Renato Corsetti, kunvenanto de la komitato de UEA pri Meza Oriento kaj Norda Afriko...

Plie pri la Mez-Orienta Kunveno

Verkis Renato Corsetti en Kongresoj kaj kunvenoj.
 Saturday je 10:44
 1 komento 1 172 vidoj

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 57-a sumoo komenciĝis la 17-a de marto dimanĉe, kaj daŭris 15 tagoj ĝis la 31-a de marto.

Partoprenis 338 legantoj el 35 landoj.

La unuaj dek landoj estis:

Japanio: (71), Koreio: (42), Brazilo: (41), Francio: (34), Pollando: (21), Rusio: (14), Britujo: (12), Tajvano: (11), Vjetnamio: (10), Italio: (9)

Bedaŭrinde, ke **Turkujo** restis en la 23-a loko kun nur unu leganto

Perfektaj venkintoj (15 venkoj): 306 el 338 (90,5%)

Komentoj:

1. Koreio reviviĝis. Kun Brazilo ili okupas la 2an kaj la 3an lokon. Longe Francio okupis la 2an lokon, sed jam ne.
2. Ĉi-foje svisaj gelernantoj ŝajne ne partoprenis. Svisujo tute dependas de geknaboj.
3. Unu partoprenis el Oceanio kaj du el Afriko.

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>



UEA



N-ro 792 (2019-04-05)
Nova video-listo ĉe la jutuba kanalo de UEA montras, kiom mojosa estas la UK

UEA aldonis al sia kanalo ĉe Jutubo la diversajn filmetojn pri la 103-a UK de Lisbono, [...]

N-ro 793 (2019-04-08)

La 48-a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK) en Lahtio

La 48-a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK) okazos de la 20-a ĝis 27-a de julio 2019 en Lahtio, [...]

N-ro 794 (2019-04-10)

La unua numero de Unesko-Kuriero por 2019 (jan-mar) omaĝas la Internacian Jaron de Indiĝenaj Lingvoj

En februaro 2019 UEA mesaĝe gratulis Uneskon kaj UN pro ties kreskanta atento al lingva diverseco, kaj emfazis [...]

N-ro 795 (2019-04-11)

Internacia Kongresa Universitato (IKU) en Lahtio: rektoro kaj programo

Kunlabore kun la IKU-sekretario, Amri Wandel, UEA informas, ke laŭ rekomendo de la [...]

N-ro 796 (2019-04-15)

Eventa Servo fariĝas nova servo de UEA

Kun granda ĝojo UEA informas, ke la retejo Eventa Servo (eventaservo.org/) fariĝis nova servo de la Asocio. [...]

N-ro 797 (2019-04-17)

Pretiĝas nova forumo por UEA-membroj

Responde al la alvoko publikigita en Gazetara Komunikado n-ro 769 (la 4-an de decembro 2018) krei novan [...]

TEJO



Reprezentu TEJO-n en la komitato de UEA
Ĉu vi ŝatus

reprezenti TEJO-n en la komitato de UEA? La 20-an de julio komenciĝos nova trijara komitata periodo, kaj TEJO, kiel reprezentanto de la junaj esperantistoj, rajtas havi 2 komitatanojn A en la komitato de UEA. Jes, sonas... [...]

Tuluzume – TEJO-delegacio partoprenis la Esperanto-Semajnon en Francio

Inter la 10-a kaj la 20-a de marto 2019 okazis la Esperanto-Semajno (SemEo), organizita de Esperanto-Kultur-Centro (EKC) de Tuluzo, en Francio. TEJO-delegacio partoprenis la eventon. La TEJO-volontulino Manuela Burghilea rakontas pri la sperto. Bonan legadon! Tuluzume Kiel iama volontulino de... [...]

TEJO serĉas programistojn

Ĉu vi ŝatus programi kaj scipovas verki kodon en NodeJS, JavaScript, kaj SQLite? Se jes, helpu TEJO-n disvolvi ĝian internan kunlaborplatformon, la Centran Reton! Ni serĉas programistojn, kiuj ŝatus volontule kunlabori kune por krei pli kaj pli da servoj... [...]

Reteja prizorgado de tejo.org

Ĝisdatigo: La laboroj de reteja prizorgado finis. Niaj retejoj tejo.org, reto.tejo.org, ijk.tejo.org estas nun denove alireblaj. La teamo de TEJO dankas nian volontulon Mia Nordentoft, kiu efike kaj rapidege prizorgis la laborojn! Pro laboroj de reteja prizorgado, ekde la 10:00... [...]



Leteroj de niaj legantoj



Saluton!

Dankon pro via Revueto Turka Stelo. Mi ŝatas la poemon de Ŝtefo Urban kaj tradukis ĝin. La traduko aperigis en mia

fesbuko je:

<https://www.facebook.com/abengo.chaoming/posts/2282172918528052>

Amike,

Abengo Cho, el Tajvano



Mi ŝatas vian revuon "Turka Stelo". Kelkajn mi jam elŝutis. Nun mi ŝatus ilin ricevi regule. Bonvolu sendi ĝin al mia retpoŝtadreso. Eble mi ŝatas ankaŭ kontribui. Gratulon ankaŭ pro la eta jubileo de la 40-a numero de via ĉarma revuo. Tio ne estas nenio.

Amike,

Frank Lappe, el Germanio



Kara amiko,

Mi bonorde ricevis la aprilan numeron de "Turka Stelo", kiu estas tre interesa kaj alloga. Koran dankon, ke vi aperigis mian rakonton "Fideleco".

Georgi Miňalkov, el Bulgario

Grava festo en urbo Galabovo

Loka Esperanto societo "Kolombo de la paco" festis sian 45-an jariĝon. La festo okazis inter la 30-a kaj 31-a de marto.

La dommastroj tre bone organizis la festadon. Tiu societo estas fama en Bulgario kaj ĉiam estas je unua loko. La fondinto estas s-ro Kanjo Kanev, konata ne nur en Bulgario sed ankaŭ eksterlande.

En la urba domo de kulturo komencis la belega festo. Riĉa kultura programo plenumita je Esperanto de lernantoj el lokaj lernejoj. La lokajn esperantistojn salutis s-ro Boris Gaĝanov, prezidanto de Bulgara Esperanto Asocio.

Samtempe salutvortojn elparolis la redaktoro de la


verkis kaj sendis Angel Maglov el Bulgario

revuo "Bulgara Esperantisto" s-ro Georgi Miňalkov. Dum tiu festo ankaŭ okazis datreveno de la revuo Bulgara Esperantisto - 100 jaroj pasis ekde la unua numero.

En la salono okazis ekspozicio kun multaj numeroj de la revuo Bulgara Esperantisto kaj esperantaj vidindaĵoj de la loka societo. Partoprenis multaj gastoj el diversaj regionoj de Bulgario.

Post la festo la amika etoso daŭris en bela restoracio. La bela muziko donis eblecon kaj ĉiuj de ni kantis, dancis kaj amuziĝis.

verkis kaj sendis **Angel Maglov** el Bulgario



03.30.2019 17.43

KINO EN LA OMBRO DE VIA RIDETO

S-ino Ardant, Nia unua renkontiĝo estis en la filmo “La virino apude” (La Femme d'à côté). Ĉi tiun filmon mi memoras pro ĝia plej amora sceno. Tamen mi ne memoris vin pro via seksallogo. Mi eĉ forgesis la nomon “Fanny Ardant” delonge. Kiel tio okazis, ke poste vi enfiksiĝis en mia kapo? Ĉu nur pro ĉi tiu filmo? Eble. Mi ne memoras la kialon. Kiom da viaj filmoj mi vidis ekde tiam? Ne tiom multajn... “Gaja Dimanĉo” (Vivement Dimanche), “8 Virinoj” (8 Femmes), “Preter la Nuboj” (Beyond The Clouds), “Nathalie”...



“Fanny Ardant” ! Eĉ la tono de via nomo estas tiom agrabla. Mi ŝatis vian angulan vizaĝon, vian larĝan makzelon, viajn grandajn okulojn kaj vian plej belan rideton.

Kaj vi venis al Istanbul en la jaro 2008. Vi ludis la teatraĵon de Marguerite Duras “La Malsano de Morto” (La Maladie de la Mort). Luj laŭdis ĉi tiun unu-personan teatraĵon. Mi mem enuis. Sed mia intenco estis spekti vin; kaj ne la teatraĵon. Mi planis veni al la kuliso kun iu malnova amiko de mi, kiun mi renkontis en la enirejo. Sed ni decidis rezigni nian decidon - ĉar la kuliso estis tro homplena. Do, ni decidis sidiĝi en la kafejo apud la elirejo de la teatrejo kaj atendi vin. Ni trinkis kapuĉinojn, babilis multe; kaj eble pasis pli ol duonhoron. Jen, ĝuste tiam mi vidis vin kaj viajn du oficirojn elirante el la teatrejo tra la elir-koridoro. Mia amiko estis sidanta kun la dorso flake al vi. Do mi avertis lin kaj diris, “Jen, ŝi venas! Tie!”. Ni estis sidantaj tre proksime al la pordo. Mi ekstaris dum vi preterpasis nin. Ankaŭ mia amiko ekstaris. Ni interŝanĝis rigardojn kun vi. Vi ridetis al ni, kun via modesta sinteno, etendante viajn larĝajn lipojn, samkiel en viaj filmoj. Brila, simpatia kaj refreŝiga rideto ĝi estis. Vi diris “Bonsoir...” ni respondis “Bonsoir Madame...” Mi volis diri ion pli, sed mi

senmoviĝis.

Vi estis legenda aktorino. Sed vi estis homo. Homo kreita el karno kaj ostoj. Kvankam mi scias tion, mi ankoraŭ estas ravata. Francaj frazoj flugis en mia kapo. Mi volis komplimenti sed glaciĝis. Ĉio kion mi povis diri estis nur tio: “Bonsoir Madame...” Nur tiom! Mia amiko, kiu diplomiĝis de franclingva mezlernejo, eĉ ne povis diri ion ajn al vi.

La minibuso atendanta vin, post vi eniris en ĝi atendis iom pli sur la strato. Ni demandis unu la alian ĉu ni pluiru al la minibuso aŭ ne. Ni, la timemaj! Ni fariĝis stultaj. La minibuso forveturis. Ni faris ion pli stultan kaj iris al Taksim placo, mallonga distanco de Beyoğlu, al via hotelo: La Marmara. Ni donis vian nomon al la akceptisto. “Sinjoroj, la instrukcio donita estas ke ŝi intervidiĝos kun neniuj.” li diris. Ĉu la akceptisto donus al mi la telefonon, kion mi dirus al vi? “Ni estas viaj fanoj. Ĉu ni povas paroli?... nu... do... jen...” Ĉu ni eble tiam esperis, ke vi venus al la vestiblo aŭ invitus nin al via ĉambro? Ni faris stultajojn tiel, kiel enamiĝintaj adoleskantoj.

S-ino Ardant, mi vidis vin piedirante al la teatro la saman vesperon. Vi venis hazarde. Ridante al la strataj infanoj pendantaj sur la tramo, vi rigardis al ilin kun kompatato. Mi vidis la saman humanan, senarogantan, plaĉan rigardon same, kiam vi diris “Bonsoir...” al ni.

S-ino Ardant, en somero de 1995, mi rolis en turka-franca filmo kunproduktaĵo. En septembro de la sama jaro mi iris al Parizo, esperante labori en kino aŭ teatraĵo. Mi restis en la domo de mia amikino. Mi vizitis la aktoron Jacques Gamblin, kun kiu mi rolis en la sama filmo somere. Mi ankaŭ vizitis la direktoron de la filmo en Parizo. Gamblin diris, ke li estis ludanta en filmo, kaj eble vi ankaŭ venos al la loko, kie la posta epizodo estus filmota. Mi iris renkonti Gamblin en tiu loko. Ankaŭ Dominique, asistantino pri kontinueco de nia filmo en Istanbul, estis tie. Tamen vi ne venis en tiu tago. Via ital-devena edzo, la foto-direktoro de la filmo, estis tie. Gamblin konatigis nin, ni manpremis, jen ĉio. Li estis okupita. Mi lasis noton al la asistantino. “Ĉu vi povas sciigi min pri la tago, kiam Fanny Ardant venos al la scenejo?” Mi antaŭsentis, ke ŝi ne telefonos, sed vi scias... nur atendo, nur malgranda espero.

Mi spertis la eblecon renkonti vin unufoje; kaj la duan fojon, ni efektive renkontiĝis: “Bonsoir ...”. Do jen ĉio!

Pro la memoro de ĉi tiu renkontiĝo kaj la mallonga saluto de vi, en 2016 mi verkis teatro-spektaklon kaj

>> 31

35 JAROJ DE ESPERANTISTA DOMO PRI KULTURO

“D-RO IVAN KIRĈEV” ur. RAZGRAD, BULGARIO

Ĉijare la geesperantistoj el urbo Razgrad festas 95 j. organizitan Esperantan movadon, kaj 35 j de la fondo de la Esperantista domo pri kulturo.

Laŭ la informo sur la paĝo de la ĵurnalo “Razgrada vorto” /Razgradsko slovo/ numero 64/06.01.1924jaro oni povus legi:

“En nia urbo estis organizita Esperanto-grupo-sekcio de Bulgara Esperanto-Societo – Sofio. La grupo konsistis el 50 membroj. Ĝi malfermis liberan kurson por komencantoj. Registrado de la novaj lernantoj en Lingvovendejo “Esperanto””.

Laŭ la informo, citita supre, oni temas pri tio, ke la razgrada Esperanto-movado kondukis sian komencon ekde multe pli frue ol tiu ĉi dato ĉar:

Nur kelkaj faktoj – kvindek homoj estas tro multe por entuziasmoj, kiuj ĝis tiam ne estis organizitaj en grupo; organizas kurson por komencantoj signifas, ke estas instruisto jam kompetenta en la lingvo; la ĉeesto la librovendejo “Esperanto”, ankaŭ konfirmas nian supozon; en la Vira lernejo ‘Josif I’ oni lernas Internacian lingvon dum la lernojaro 1921/22. Esperanton instruis la razgrada instruisto Ivan Nenov; kaj la fina pruvo de nia supozo, ke la Esperanto en nia urbo estis organizita pli frue estas la fakto, ke en la Jarlibro de Universala Esperanto-movado ekde 1906 aperas adresoj de kvin esperantistoj el Razgrad. Bedaŭrinde ĝis nun ni havas nenion alian informon pri la komenco de nia esperanta movado.

Sed rilate al Esperantista Domo pri Kulturo “D-ro Ivan Kirĉev” ni havas precizan daton de ĝia fondo. Laŭ la ideo de la elstara bulgara esperantisto kaj tiama prezidanto de la Distrikta estraro en Razgrad d-ro Ivan Kirĉev estis fondita la 16an de novembro 1984 Centro pri Esperanto-kulturo, la nuna Esperantista domo pri kulturo, kun prezidanto ĝia fondinto d-ro Kirĉev. Kiel metodistoj laboris s-inoj

Stefanova, Zagorova, Petrova kaj de la jaro 1989 kiel sekretarino estis enoficigita Ivaniĉka Maĝarova kaj post la morto de d-ro Kirĉev ŝi estis prezidanto ĝis 2011 j. kiam la Prezidantecon prenis filologo Dimitrinka Kateva.



La Domo organizas kaj okazigas diversajn esperantajn aranĝojn kun riĉa enhavo: literaturajn konkursojn, konferencojn, poeziajn kaj muzikajn vesperojn, prezentadon de la libroj, jubileajn solenaĵojn, kvizojn, solenaĵojn, dediĉitajn al jubileuloj membroj de EDK, renkontiĝojn kun talentaj homoj – verkistoj, artistoj, pentristoj, poetoj, k.a. Jam kelkajn jarojn la Domo organizas dum la monato decembro Zamenhofajn tagojn, dediĉitajn al la kreinto de la Internacia lingvo kun riĉa programo. Nia Domo bone laboras kun aliaj kulturaj institucioj en nia urbo, sed la plej grava kaj konsiderinda, kun granda signifo estas nia jam 29 jaroj, tradicia festo EKRA – Esperantista Krea Renkontiĝo “Abitus” kun Internacia literatura konkurso por originala esperanta poezio kaj humuraĵoj. En la konkurso partoprenas esperantaj verkistoj el diversaj landoj – Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko, Aŭstralio. La konkurso estas sub la aŭspicio de la revuo “Literatura foiro”, organo de la Esperanto PEN klubo. La revio aperigas ĉiujn premiitajn verkojn. La verkoj same aperas en nia ĉiujara eldonata almanako “Esperantista tribuno”. / ĉi jare la numero estas 29/. Sur ĝiaj paĝoj oni povas tralegi artikolojn pri niaj diversaj Esperanto-aranĝoj, nia historia pasinteco, recenzojn pri novaj esperantaj libroj, pri landaj kaj eksterlandaj eventoj k.a. La “Esperantista tribuno” atingas rete geesperantistojn en la tuta mondo.

Lastajn ses jarojn ni aldonis kaj nacian konkurson por traduko de verkoj, aŭ fragmentoj el la romanoj de famaj bulgaraj verkistoj kiel Aleko Konsantinov, Dimitar Talev k.a., okaze de liaj jubileoj, kaj la verkoj de nunaj esperantaj verkistoj skribitaj bulgarlingve kiel



Georgi Mihalkov kaj aliaj.

Ĉe EDK pli ol 25 jaroj funkcias vokala grupo por malnovaj urbaj kaj esperantaj kantoj "Sopiro". Ĝi partoprenis artprogramojn de la kongresoj de BEA, festivalojn, esperantajn festojn en nia urbo kaj en la lando. Kun gvidantino s-ino Radka Stojanova funkcias popola vokalgrupo. Longan tempon ĉe la Domo laboris same Infana vokalgrupo "Ruĝa Papavetoj". Bedaŭrinde post la modifo de la administrado en nia lando ĝi ĉesis funkcii.

Jam estas tradicio dum EKRA prezenti la novajn esperantajn librojn. Lasta tempe estis prezentitaj libroj da la fama poeto, verkisto, ĵurnalisto, tradukisto kaj esperantisto Venelin Mitev el Sofio, fama verkisto el Sofio Georgi Mihalkov, kvar poeziaj verkoj de la razgrada talenta poetino Lilia Nikolova, libro de la ĵurnalistino Boĵidarka Zlatareva, poezio kaj prozo de Ivaniĉka Maĝarova kaj aliaj.

En jaro 1999 dum la EKRA kaj laŭ la iniciativo de la kooperativo "Literatura foiro" okazis la kvina Danuba Esperanta Renkontiĝo. Ĝin partoprenis multaj gastoj landaj kaj eksterlandaj. Dum la festo estis malfermita la bareliefo de d-ro Zamenhof sur la muro de la Esperantista Domo. Ĝin kreis la talenta skulptisto kaj esperantisto Bogomil Ĵivkov. Estis eldonita same poezia libro kun versoj de la razgradaj verkistoj en Esperanto "Sonoj kaj kredoj el Razgrad". Okaze de 25 jaroj Internacia literatura konkurso EKRA dum la jaro 2015 EDK eldonis Antologio "Abritus" kun

premiitaj verkoj.

Dum la EKRA-16 la Esperantista Domo organizis Balkanan esperantisan renkontiĝon kadre de kiu okazis Esperanta konferenco je temo: "Disvolviĝo kaj pureco de la Internacia lingvo Esperanto". En ĝi partoprenis multaj geesperantisoj el la lando kaj eksterlandanoj - el Kroatio, Serbio, Rumanio, Hungario. La bazan prelegon je la temo preparis la fama bulgara Esperanto- instruisto kaj tradukisto, bedaŭrinde jam forpasinta, Nikola Uzunov. Prelegis same s-ro J. Pleadin el Kroatio kaj G. Mihalkov kaj Eva Bojaĝieva el Bulgario.

Nia Domo ĉiujare organizas kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Bedaŭrinde lastatempe la junuloj ne deziras lerni Esperanton. Ili preferas anglan, francan, kaj hispanan lingvojn.

La ora krono de nia esperanta agado estis dum la jaro 1993, kiam EDK kaj E-o societo organizis la 43an Nacian kongreson de BEA.

Pro bona organizaĵo EDK estis alte prezita de la partoprenantoj kaj Bulgara Esperanto – Asocio.

La Domo havas propran bazon, kio helpas nin realigi riĉajn kaj multaspektajn esperantajn aranĝojn

verkis kaj sendis **Ivaniĉka Maĝrova** el Bulgario
*vicprezidantino de EDK "D-ro Ivan Kirchev" -
Razgrad, Bulgario*

TERLIMOJ

Terlimoj

En la senlim' ekzistas tenta fort' –
Laŭ ŝtonoj, laŭ plugej', vojrand' l' altira,
Kaj kia ĝoj', ke la destino – sort'
Hazarde naskis vin la piedira.

Se al vojad' vin vokas franda ond',
La spacsopiro vin vojigu bene.
Flor' dormetanta sur dekliv' de mont',
Renkontas vin, kiel konat', matene.

Kio 'stas voj'? De kruroj translokad'
Al horizont' kaj altaj nubotronoj.
Vin, grandan kaj solecan, la vivpad'
En sin enigis je l' vastegimponoj.

Alproprigite de l' pejzaĝdefi',
Tutmergiĝinte en la vojpasion,
Nevidebliĝos, surdos, mutos vi,
Sed fakte vi eĉ ne rimarkos tion.



verkis **Jevgenij Vinokurov** el Rusio
tradukis **Klara Ilutoviĉ** el Rusio
sendis **Lenke Szász** el Rumanio

Foto de Lenke Szász

Estas ofte en la homa vivo okazoj tre komplikaj, kiuj, kvazaŭ netrapaseblaj baroj, altiĝas antaŭ ni kaj signas nian homan nepovon. Tamen, la antikvaj helenaj saĝuloj diris, ke ĉia problemo havas sian solvon kaj tio ŝajnas al mi tute ĝusta. Notinde, ke la helendevena vorto “problemo” (πρόβλημα) havis kelkajn kromajn signifojn, inter kiuj tiujn de “malhelpo”, kaj “preteksto”, kaj “defendo”. Serĉante inter miaj tre malnovaj memor-spuroj, mi atingas du menciindajn kazojn. La unu estas historia, estas tio pri la gordia nodo (γόρδιος δεσμός), kiun distranĉis Aleksandro (Αλέξανδρος) la Granda kaj la dua estas tio pri la fadeno de Ariadna. Kaj ĉar Ariadna estas unu el miaj tre amataj mitaj heroinoj, mi rakontos ĉi-sube ŝian tre interesan historion.

Ariadna estis reĝidino, unu el la filinoj de la tre potenca kaj glora reĝo de Kreto (Κρήτη), Minoo (Μίνως aŭ Μίνωας). Tiu Minoo estis unu el la tri filoj de la plej granda helena dio, de Zeŭso (Ζεὺς), kiujn tiu lasta akiris el sia amatino Eŭropa (Ευρώπη). Kiel diido, do, li estis viro nobla, tre fieraj kaj honesta, tute justa, sed samtempe tre severa kaj rigora. Kaj li estis tre severa kaj malmilda ne nur kiel suvereno, sed ankaŭ kiel patro, tiel, ke Ariadna, spirito liberama kaj ribelema, suferis pro la striktaj vivkondiĉoj kiujn altrudis al ŝi la palaca regularo.



Antaŭ jaroj, estis eksplodinta granda milito inter Kreto kaj Ateno (Αθήνα aŭ Αθήναι), en kiu la kreta armeo estis venkinta la tiam ne sufiĉe fortan atenan armeon. Inter la kondiĉoj de la interkonsentita pactraktado estis la devo de la venkitoj liveri ĉiujn naŭ jarojn al la Kretanoj, kiel submetimposton, ses junulojn kaj ses junulinojn. Tiuj malfeliĉaj gejunuloj estis per ŝipoj kondukataj al Kreto, kie la senindulga Minoo oferis ilin, voraĵon al Minotaŭro (Μινώταυρος), la konata monstro, kiu havis korpon de viro kaj kapon de taŭro. Tiu terura monstro vivis en la labirinto (λαβύρινθος), stranga konstruaĵo konsistanta el sennombraj divers-longaj kaj divers-larĝaj, kurbaj,

rektaj, zigzagaj koridoroj, kiuj interplektiĝis inter si kaj kondukis al senlumaj kaj seneliraj keloj. Tiel, estis tute certe, ke homo kiu enirus en ĝi, neniam povus trovi eliron, ke post longa aŭ nelonga vagado, li nepre trovus nur Minotaŭron!



Tamen, kiam venis la tempo por la tria tia abomena pago, la cirkonstancoj en Ateno estis tute ŝanĝitaj; la maljuna atena reĝo, Egeo (Αιγέως), ne plu estis sola kaj malforta, ĉar la ĝis tiam nekonata lia sola filo, la granda, renoma jam, nevenkebla heroo Tezeo (Θησεύς) estis veninta al sia patrujo.

Do, la juna, temerara reĝido, propravole prenis la lokon de unu el la lotelektitaj junuloj kaj veturis kun la ceteraj kondamnitaj al Kreto. Tezeo faris tion, ĉar li bone sciis, ke li povos venki kaj mortigi la kretan monstron kaj tiele liberigi sian patrujon de la humiliga imposto.

Kiam la ŝipo atingis la kretan havenon kaj la atenaj gejunuloj elŝipiĝis, kolektiĝis ĉirkaŭ ili scivolemaj kretaj civitanoj, kiuj observadis la fremdulojn. Laŭ ordonoj de Tezeo, la junuloj montris sin sentimaj, tre trankvilaj, tiom kuraĝaj, ke ili komencis sin ekzerci atlete, luktante inter si kaj farante diversajn gimnastikajn ekzercojn. Inter la scivolaj spektantoj estis ankaŭ Ariadna, kiu, kaŝante sian vizaĝon eniĝis en la popolan amason, por rigardi de proksime la strangajn agojn de la fremdaj junuloj. Tamen, kiam la junulino ekvidis Tezeon, kies brila beleco estis tute neordinara, tuj enamiĝis al li. Post nelonge ŝi aŭdacis aliri tute apude al la, metita ĉirkaŭ la Atenanoj, baraĵo, por paroli al la bela fremdulo. Impresis ŝin ankoraŭ pli multe lia fieraj sinteno, lia kuraĝo kaj lia certeco, ke li nepre venkos kaj mortigos la teruran monstron. Tamen, kiam Ariadna demandis lin kion li faros post la mortigo de Minotaŭro kaj kiamaniere li eliros el la labirinto, ŝi konstatis, ke la sentima heroo havis nenian planon kaj neniun certan ideon. Tiam, la reĝidino oferis al sia amato la solvon, ŝi diris, ke ŝi donos al li grandan volvaĵon el dika fadeno, kies la komencon ŝi ligos ĉe la enirpunkto de la labirinto. Tiele, tenante ĝin kaj irante tra la koridoroj, Tezeo iom-post-iome disvolvos kaj lasos post si la fadenon, tiel, ke en la reveno, revolvante ĝin, li sekvos la saman vojon por atingi la enirpunkton. Tio estis la tute simpla, praktika solvo, kiun nur cerbo virina, eĉ cerbo de enamiĝinta virino povus ekkapti. Fakte, Tezeo, kondukante siajn gekolegojn, eniris sentime en la labirinton, li vagis en ĝi longe tra la kunplektitaj vojetoj, ĝis kiam li atingis la sovaĝan, furiozan Minotaŭron. Sekvis terura korp-

batalo kun la konata rezulto, Tezeo mortigis la monstron kaj sekvante la planon de Ariadna, revenis senprobleme kaj atingis la elirejon, en kiu nur Ariadna atendis lin.



Ĉio estis perfekte organizita, la atena ŝipo, bone provizita, estis tute preta, la veloj de la kretaj ŝipoj, ligitaj ĉe la haveno, estis jam tute disŝiritaj de fidelaj servistoj de la reĝidino, do, neniu povus persekuti la eskapintojn, la foriro el Kreto estis tute certa kaj sendanĝera. Laŭ la plano, la geamantoj kaj la atenaj gejunuloj tuj enŝipiĝis kaj foriris en etoso de senbrida ĝojo kaj junula, gajoplenua humoro. Ŝajnas tamen, ke tio ne daŭris longe, ĉar, la duan tagon post la foriro, la ŝipo renkontis tre malbonan veteron. Estis vera ŝtormo, kiu kaŭzis multajn problemojn, precipe al Ariadna, kiu malsaniĝis serioze. Kiam okazis tio, la ŝipo baraktadis freneze, proksime al la insulo Nakso (Nákσος), tamen kontraŭa forta vento ne lasis ĝin alboridiĝi. Kiam iĝis klare ke la vivo de la junulino estas en granda danĝero, la temerara Tezeo faligis malgrandan remboaton en la maron, li ligis ĉirkaŭ sia korpo la senkonscian Ariadnan, kaj per klopodo kaj forto superhoma, remante, sukcesis atingi la teron. Tie, li donis multan monon kaj lasis sian amatinon al la flegado de lokaj virinoj, li promesis ke baldaŭ li revenos kaj per la sama boato, post nova titana batalo kontraŭ la ondegoj li revenis al la ŝipo por ĝin komandi kaj savi.

Estis pasintaj kelkaj tagoj, kiam Ariadna rekonsciiĝis kaj reakiris siajn fortojn kaj klaran penskapablon. Ŝi tuj konstatis, ke ŝi estas sola inter fremdaj virinoj, ke Tezeo ne estas apud ŝi. Nu, en stato de neeltenebla malĝojo kaj malespero, ne povante reteni la teruran timigan penson, ke ŝia amanto pereis en la maro, plorante kaj plendante atendadis lin ĉe la marbordo. Post kelkaj tagoj, lokaj fiŝistoj revenantaj hejmen post longa restado en la maro, kun certeco diris, ke ili renkontis antaŭ tagoj la atenan ŝipon, kiu, en tre bona stato, sekure direktiĝis al Ateno.

Tiam, Ariadna konsciis la teruran veron, ke ŝi estas forlasita de sia amato. Ni ĉiuj scias, ke tio estas ja la

plej doloriga bato, kiun povas akcepti virino, ni ĉiuj komprenas al kia despero kaj malfeliĉo estas kondukata tiele perfidita enamiĝinta virino. Tamen, tia konduto ne decas al viro nobla, des pli multe al heroo bonkora kaj afabla, kiel estis Tezeo. Kio, do, okazis?

Tiu, ordinara laŭ la unua rigardo, amhistorio estis tamen komplika, simple ĉar en ĝi estis sin enmiksintaj multaj dioj, kaj mi tuj eksplikos: Unue estis Atena (Αθηνά), la granda diino de la saĝeco, vera mastro kaj eterna protektanto de Ateno, do, ankaŭ de ties reĝoj kaj loĝantoj. Ni ne forgesu, ke Tezeo, en la efektiveco estis filo de la granda dio de la maro, Pozidono (Ποσειδών), ke Ariadna estis nepino de Zeŭso mem, do, ni notu, ke la plej signifaj dioj interesiĝis pri la sorto de niaj herooj. Tamen, la veraj ĉefroluloj de tiu ĉi historio estis ne tiuj, vere potencaj, sed iom krudaj dioj, sed du aliaj, plej petolaj, ĉarmaj, ruzaj, plaĉaj. Unue estis Dionizo (Διώνυσος), la dio de la fekundado, de la ĝoja vivo, de la distro, de la amuziĝo, de la vintrinkado. Tiu Dionizo, estis antaŭ longe pasie enamiĝinta al la kreta reĝidino, tamen li aŭdacis nek forrabi nepinon de Zeŭso, nek sin prezenti antaŭ la rigora kaj ekstreme severmorala Minoo, kiu neniam akceptus kiel edzon de sia filino viron, kies la ĉefa celo kaj okupo estas la senĉesa ĝuado. Tamen, kiam li komprenis, ke la ĉasta, knabina amo de Ariadna kondukas ŝin en la brakumon de alia viro, tuj kuris ĉe Afrodita (Αφροδίτη), la sola kiu povus lin kompreni, kaj petegis pri ties helpo, pri la helpo de la diino de la amo mem.

Nun, espereble, ĉio iĝas klara, same kiel komprenebla iĝas nun tio, ke Inaro (Οίναρος), la granda ĉefpastro de Dionizo en Nakso, ekde la unuaj tagoj, prenis sur sin la taskon prizorgi persone, protekti kaj gardi, en la grandan templon de la dio, la malfeliĉan, forlasitan junulinon. Estis, do, Afrodita, tiu, kiu konvinkis Pozidonon, unue kaŭzi la ŝtormon, kaj due malhelpi la ŝipon de Tezeo reveni al Nakso. La granda dio volonte faris tion, ĉar ankaŭ li sciis, ke, en la efektiveco Tezeo ne amis Ariadnan, ke li decidis edziĝi kun ŝi pro honesteco kaj ĉar li ŝuldis al ŝi grandan dankon.

Pasis kelkaj ankoraŭ tagoj kaj kiam Ariadna ŝajnis sufiĉe trankvila, Afrodita mem prezentiĝis antaŭ ŝi kaj eksplikis al ŝi ĉion. Ŝi inspiris al ŝi novan amon kaj oferis al ŝi la donacon de ŝia fianĉo. Mi mencias la donacon, ĉar tio estis la plej valora, plej bela, plej majstre farita objekto, ora krono, ornamita belege per abundo da raraj, ĉiaspecaj, ĉiakoloraj, brilegaj gemoj. Ĝi estis juvelo ĝustedirate unika, farita de Hefesto (Ηφαιστος) mem, la granda dio-artisto, kiu, kompreneble, plenumis unu ankoraŭ ardan deziron de lia edzino, Afrodita, kaj pro tio uzis sian tutan sperton,

kapablon, artisonon.

Sekvis la geedziĝo, en la plej gaja, plej ĝoja kaj distra nupto, en kiu ne nur ĉeestis, sed brue amuziĝis,



kvazaŭ mortemuloj, ĉiuj, ĉiaklasaj dioj kaj diaĵoj.

Ariadna vivis feliĉe, ĉe la flanko de la ĉiam enamiĝinta al ŝi gaja dio, ŝi naskis du bravajn filojn, ŝi multe amuziĝis, dancis, kantis, ridis, kaj post multaj tiaj sennubaj jaroj ŝi foriris kun sia amata edzo al Elizeo (Ηλύσια Πεδιά), kie ŝi eterne vivas feliĉe.

Mi konfesas, ke estas multaj versioj de la historio de Ariadna. La homoj kutimas ĉiam aldoni ion sian al

la plej interesaj, ordinare priamaj, historioj kaj tiele estas konstruataj, en la daŭro de jarmiloj, la tiom allogaj mitoj. Tiel, ne nur en Kreto, ne nur en Ateno kaj en Nakso, sed ankaŭ en Deloso (Δήλος) en Cipro (Κύπρος), en Ĥio (Χίος), en multaj ankoraŭ lokoj de la tuta helena lando, oni rakontis ion kroman, ion aldonan pri nia heroino, kaj ĉie la homoj organizadis je ties memoro kaj honoro ritojn, ceremoniojn, festojn, aranĝojn ĉiam distrajn, akompanatajn de vin-trinkado, kantado, dancado, flirtado, ĝojo.

Pri tiu krono de Ariadna, la plej bela artaĵo de Hefesto, mi aldonu, ke post la foriro de Ariadna al Elizeo, la dioj pensis, ke tia unika dia kreitaĵo ne havas lokon sur la tero. Do, ili decidis pendigi ĝin sur la ĉielo, kie eterne ĝi restas, oferata al la eterna admiro; ĝi ja estas unu ankoraŭ konstelacio (Corona Borealis / Βόρειος Στέφανος), kiu ĉiam rakontas tiun ĉi, espereble ĉarman, mian historion.

--- el GEMOJ EL LA HELENA HISTORIA KAJ MITOLOGIA TREZORO

verkis Spiros Sarafian, el Grekujo

La akvodukto historieto de Segovia, Hispanujo sendis Mauricio Brucco el Hispanio

Saluton miaj karaj!

Hieraŭ mi vizitis la urbon "Segovia", fama pro la impona akvedukto roma, kaj legante kuriozaĵojn el vikipedio pri ĝi, mi malkovris malnovan legendon kiun nun mi ŝatus rakonti al vi esperante:



"Estis iam virino el segovio, kiu, ĉiutage, kaj plurfoje dum la sama tago, devis iri al rivero tie malproksime fluanta, por preni la akvon kiun ŝi kaj ŝia familio bezonis por trinki kaj por purigi la vestaĵojn.

Transporti la pezajn sitelojn akvoplenajn estis tre lacige, kaj ĉiam la virino elkore plendadis dirante:

- Ho, ve al mi! kion mi donus por eviti ĉi tiun

laboraĉon!-

Unutage, tuj post la kutima sinsekvo da plendoj, jen subite aperis la diablo, sub la masko de iu maljunulo, kaj li diris al ŝi:

- Mi povus helpi vin! mi povus konstrui grandan akvedukton en unu nokto, kaj vi ne plu estus devigita iri al la rivero, sed vi devus pagi tion per via animo!

La virino ekridegis laŭte, nekredante al la vortoj de tiu maljunulo, ĉar ŝajnis neeble, ke unu sola homo povas konstrui tian kolosan aĵon nur dum unu nokto,


kaj diris:

- Bone, se vi sukcesus fari tion antaŭ ol la koko ekkantus matene, mi donus al vi mian animon!

La diablo, aŭdinte tion, senmaskiĝis, rivelante sian propran aspekton, kaj per fortaj pugnobatoj li komencis fosi la grundon el kiu li eltiris grandegajn granitajn ŝtonojn, brik-formigante ilin per pliaj pugnobatoj. La virino, kompreninte, ke tiu estas la diablo, timoplene ekploregis, ĉar ŝi jam vidis sin brulante porĉiame en la infero! kaj ŝi komencis preĝi

- Dio mia, helpu min! helpu min, ne lasu, ke min forportu ĉi tiu abomenindulo!-

Kaj ŝi tiel kaj tiom multe suplikis ke finfine Dio kompatis ŝin, kaj ĝuste unu momenton antaŭ ol la diablo metis la lastan ŝtonon de la preskaŭ finita akvedukto, Dio kantigis la kokon, kaj la virino saviĝis! " Eheheh ! fino de la historieto...



sendis **Maurizio Brucco** el Hispanio




PRINTEMPO

Ekfloris frumatene
la blanka galanto.
Ĝin ekvidis kaj ekkantis
arbara birdeto
kaj la novaĵon bonan
kun ĉiuj dividis.
Printemp', printemp' ŝprucas, venas
en l' river' susuras
kaj kandeletoj - krokusoj
eklumas en arbar'.
Printempo per birdaj kantoj
plenigas l' ĉielon.
Ĝojon kaj novan esperon
portas sur la tero.
Varmaj sunradioj
la korojn varmigas.
Ĉiuj arboj ekfloras,
pleniĝas la nestoj.
Freŝec', sano, aromo
enfluas la koron.

aŭtoro d-ro **Sneĵina Stojĉeva** el Bulgario

KANTO DE LA AKVO

La fontoj fluas
surverŝas la florojn,
kiel estas pura
kaj brila la akvo!
Arĝentaj fluoj
la freŝecon disverŝas,
kun sorĉa kanto
la korojn surverŝas.
Puraj vi estu
kiel abeloj,
puraj vi estu
kiel la floroj,
klaraj vi estu
kiel la steloj,
helaj vi estu,
sunoj de l' tero!

aŭtoro **Iglicka Besson** el Bulgario-Svislando

Eventa Servo fariĝas nova servo de UEA

Kun granda ĝojo UEA informas, ke la retejo Eventa Servo (<http://www.eventaservo.org>) fariĝis nova servo de la Asocio.

Eventa Servo (ES) estas retejo kreita de la brazilano Fernando Ŝajani, kun moderna plurrimeda sistemo por listigi Esperanto-eventojn tutmonde. La celo de ES estas ebligi al Esperantistoj scii, kio okazas en Esperantio, kaj samtempe diskonigi siajn proprajn eventojn - memstare, sen interveno de ajna sistema prizorganto. La akiro por UEA estis frukto de interkonsentoj inter Fernando Ŝajani, mem donacanto de la servo, kaj la estrarano Fernando Maia Jr., kadre de lia agado pri Kongresoj.

Per sia sperto pri programado Fernando Ŝajani tute originale kreis la sistemon, kaj de nun UEA rajtas uzi la nomon de la servo kaj evoluigi ĝin kiel sian propran posedaĵon. Grupo de programistoj gvidita de Ŝajani mem estis oficiale komisiita por prizorgi kaj evoluigi la sistemon. Ĝia programkodo estas libera kaj

-- el Gazetaraj Komunikoj de UEA

disponebla ĉe <https://github.com/eventaservo> laŭ la permesilo AGPL-3.0.

Ĉiuj homoj rajtas uzi la servon senpage. Malgraŭ tio, kelkaj kostoj estas, eĉ se malgrandaj. Laŭ sia nuna stato ES postulas pagon de domajna nomo (12 USD jare) kaj servilo (po 5 EŬR monate). Danke al amikaj donacantoj, jam estas rimedoj por teni la servon ĝis oktobro 2020, tute senkoste al UEA. Dum tiu periodo la komisiita grupo esploros opciojn por plene daŭripovigi la servon. Se ankaŭ vi emas donaci por ES, kontaktu la estraron Fernando Maia Jr. per la retadreso fmaiajr@gmail.com. Alternative, vi povas fariĝi individua membro de UEA, kio eblas pere de la reta

>> 27

Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

Adnan Kastrati, altstatura grizharulo, petis unu el siaj plej intimaj amikoj, Fahri-n, veturigi lin per aŭtilo en lokon, kien, volonte ili ambaŭ apenaŭ volus iri. Malgraŭ la insisto de sia amiko ke tia vojaĝo nur malplibonigus kaj malkvietigus lin eĉ pli multe, li ne konvinkigis. Longajn monatojn li estis cerbuminta kaj decidinta iri tie, aldirante senhezite al sia amiko aŭtisto, ke, se li ne venus kun li, li mem ekirus surpiede al la tombejo de tiu granda vilaĝo, eĉ se tia pilgrimanta vojaĝo longus tutajn tagojn.

Post du horoj da vojaĝado per aŭtilo de la ĉefurbo, ili estis alvenintaj en tiu ebena vilaĝo, kun fekunda agrotero, ĝojiginta la loĝantojn per abunda tritikoj kaj maizo. La abundeco igis pli laŭdinda ĉi lokon kaj la vilaĝanojn fieraj pro ilia laboro, ĉar preskaŭ ĉiu el ili estis riĉa. Kelkaj sin okupis per agrokulturo, kelkaj per komerco, unu, kiu estis delonge riĉulo, estis malferminta grandan entreprenon, kie estis dungita la duono de la junularo, dum multaj el la familioj de ĉi tiu vilaĝo havis po unu aŭ du junaj filoj en la Okcidento.

Ne ekzistis familio plendanta pro malhavo, kio distingis la vilaĝon disde la aliaj vilaĝoj ĉirkaŭe. Nur unu malbonon havis Lakori, (tiel nomiĝis la vilaĝo), ĉar estante ebena, ne rarfoje, dum la impetaj pluvofaloj, la serpentuminta tra ĝi rivero, ellitiĝis kaj kaŭzis katastrofon en tritikujoj kaj maizujoj. La vilaĝo nomiĝis tiel, ĉar, vidite de supre, aspektis kvazaŭ fleksebla kaj ebena linio, kion bakis la suno, ĉar ne estis eĉ unu monto proksime por iel ŝildi ĝin.

Adnan kun sia amiko, ĵus alveninte en la vilaĝo, devis pluri piede iom da vojo, ne pli ol cent metrojn, ĝis la celloko. Kvankam la vojo ne estis tiel malbona, Fahri timis ŝofori la aŭtilon ĝistie. Dum tiu mallonga vojo, li eksentis ian raviĝon, kaj, la samon momenteton, li estis travivinta ĉagrenan tremon, ĉar venis en lia menso plej diversaj memoraĵoj, dolorigaj kaj senteblaj, kondukintaj en lia dudekjara pasinto. Li tute ne hastis atingi la lokon, ĉar li volis rigardi ĝisdetale ĉiujn aspektojn de Lakori, ŝanĝiginta tiel multe ekde la tempo, kiam li estis lastfoje, ĝuste antaŭ dudek jaroj. Ne plu estis tiuj ŝtonecaraj stratetoj, turniĝintaj al kotaj marĉoj dumvintre. Ĉio estis ŝanĝiginta, ĉio akiris novan aspekton.

Lakori troviĝis apudege al sia naskiĝvilaĝo, kun kio nenio plu ligis lin, ĉar la tuta sia familio estis translokita de tie. Finfine li atingis sian cellokon kaj haltis ĉe la tombo de Shpresa, mortinta ĝuste unu

jaron antaŭe. Li komencis voĉplori kiam legis kaj mantuŝis la tomban epitafon, kie oni notis la nomon, naskiĝdaton kaj mortodaton ŝian.

Li ellarmiĝis senĉese, malgraŭ la klopodoj de Fahri por haltigi lin. Ne estis facile vidi vian amikon trideksepjaran, elverŝante larmojn kvazaŭ infanon apud tombo, kovrita per subtila herbo. Adnan surmetis sur ĝi girlandon, kio, bedaŭrinde estis ja la unua kaj la sola surmetita sur tiu tombo.

Adnan estis unu el tiuj junuloj tre hontemaj, amantaj freneze kaj travivantaj ĉiutage sian suferadon. Dum la tuta mezlerneja periodo li neniun postsekvis krom Shpresa. Li estis fiksita al tiu mezstatura, nigrahara kaj nigraokula kaj brilĉarma knabino, kiun li imagis kvazaŭ anĝelon sendita de Dio nur por li. Flirtadis post ŝi dum jaroj, sed ne povante kaj nek kuraĝante sciigi sian amon per vortoj. Li nur estis rigardinte ŝin defore kaj estis ensorĉita kiomfoje li aŭdis la parolojn kaj kiomfoje li vidis ŝin rideti. Li tutanime raviĝis kiomfoje aŭdis la sonojn de tiu rido, kiuj poste eĥadis en la oreloj kaj en la koro dum longaj tagoj.

Li sendis kontinue al ŝi perantojn, bonintencaj kaj provintaj konvinki ŝin. Ĉio iris envane. Ĉiun senditon ŝi estis reveniginta malplenmane, dirante "ne!" al lia amo, dekfojojn kaj centfojojn.

Sed tio ne igis lin akcepti la neeblecon kaj rezigni, sed kontraŭe, plifiksigo lin al ŝi, kvankam li mem ne kuraĝis aldiri ŝin eĉ unu vorton, nek doni eĉ plej etan signon. Li parkere sciis la horaron kiam ŝi finis la lecionojn kaj multfoje okazis ke li forlasis la lastajn lecionhorojn, ne por ŝin haltigi, sed por subkaŝi sin en iu lerneja aŭ strateta angulo de la urbeto kaj vidi ŝian anĝelecan ĉarmon. La mezlernejaj studoj finiĝis, tiel kiel ili komennciĝis, ne dirinte sian revatulinon eĉ vorton..

Estis hazardo aŭ lia bonŝanco ke ambaŭ ili aliĝis en la sama fakstudo. Li preskaŭ ekflugis pro ĝojo kiam ekvidis ŝin en la sino de kolegaro. Simple, feliĉa sento estis trairinta lin. Konvinkita ke liaj suferadoj nun estis finiĝante, li supozis ke finfine malfermiĝus por li la padoj kaj li igus la sian, la revitan anĝelinon. Havi Shpresa-n dum kvar jaroj sinsekve en la sama loko kun si, tio estis pli ol miraklo.

Iun tute ordinaran tagon, en la lokaloj de la fakultato, tute hazarde ili troviĝis unu apud la alia. Adnan denove ektimis, kvazaŭ provus foriĝi unu paŝon disde ŝi, sed estis Shpresa kiu parolis la unua, demandante lin pri la horaro de la prelegoj, kion ŝi



estis erarinta. Ekde tiu momento, ili komencis intersalutiĝi unu al la alia, ĝiskiam iun tagon ili eksidis por kunkafumi unufoje. La lokalon elektis ŝi, ĉar li ankoraŭ ne bone konis la ĉefurbon. Ili interpatolis pri la ekzamenoj, profesoroj, kolegoj, libroj, studnotoj kaj ĉio alia koncerne la studadon, sed ne pri la amo. Simile okazis ankaŭ dum la dua rendezuo, dum la tria kaj dum la kvara.

Li sentiĝis feliĉa nur pro la fakto ke li havis eblecon renkontiĝi kun ŝi, alparoli ŝin kaj kunkafumi kun Shpresa. Tio igis lin pli ol feliĉa. Sed, iutage li decidis ne plu bremsi la buŝon kaj aldiri ŝin ke li ankoraŭ amis ŝin, eĉ pli multe ol tiam, ke ŝi estis la sola kara kozo plej sankta por li, ke ŝi estis la sola anĝelo kiun li volis havi ĉebrake. Kaj tiu tago venis. Shpresa akceptis malvarme la sentoplenajn vortojn de Adnan, redirante ruzece ke ŝi ankoraŭ ne pretpretis eniri en tian rilaton. Unue ŝi devus finstudi, trovi dignan laborpostenon kaj simile rezonante, kio tamen donis lin iomete da espero. Por li ne estis problemo la atendo. Sufiĉis ke ŝi estu apud li.

Dum la kvar jaroj, sinsekve, li aldiradis ŝin la samajn vortojn kaj ŝi respondis pretprete per la samaj rezonaĵoj esperigaj por la junulo, kiu nun estis komencinta malfermiĝi, alparoli kaj akompanati ankaŭ kun aliaj knabinoj. Ne plu li estis tiu timemulo iama. Li eĉ komencis la unuan amrilaton kun la altstatura Violeta, kion li klopodis teni kaŝitan al sia adoritulino, malgraŭ la vortoj de lia tiama kaj hodiaŭ amiko, Fahri, kiu diradis ke la altstatura Violeta estis pli bela ol Shpresa. Tiel li agis ankaŭ kiam amrilatis kun Merita, Albana kaj Drita. Lin amis ĉiuj knabinoj, eĉ ankaŭ multaj aliaj alproksimiĝis, pliigante tiel la nombron de liaj provizoraj amrilatoj. Li tenis kaŝita ĉiujn tiujn rilatojn. Li frezeziĝis se ŝi ekscius ion, ĉar profunde en si, li sentiĝis kulpa, pensante ke tiel li estis perfidante ŝin.

Li fariĝis la preferito de la knabinoj, ĉar li estis la plej klera de la generacio kaj unu el la plej ĉarmaj. Tiutempe li ne havis la hodiaŭajn blankharojn, sed la brilecon de la korvokoloraj bukloj de sia hararo.

Sed la menso lia sidis aliloke. Nur ĉe ŝi kaj ĉe neniu alia. Envane klopodis sia amiko longajn jarojn forigi tian fiksiĝon de li, dirante ke ŝi restas kun vi numre ĉar ŝi bezonas vin kiel helpanto por la ekzamenoj kaj nenio alia, sed al li sufiĉis nur esti ĉe ŝi kaj babili kun ŝi. Plue, Fahri estis eĉ dubinta pri la ĉasteco ŝia, rakontante detale lin pri ŝiaj du flirtoj kun aĝulaj viroj, same kun la profesoro de la plej malfacila studobjekto, Selim, al kiu ŝi estis enmanigita nur por transpasi la ekzamenon.

Sed li nur ekridis, konvinkita ke sia amiko nur estis

parolaĉante por forigi la atenton lian de ŝi. La tuta generacio kredis ke Shpresa estis kundorminta kun la profesoro pro la ekzameno, tre malfacila por ĉiuj, krom Adnan. Por li Shpresa estis netuŝita sanktulino.

La studoj finiĝis, ambaŭ ili dungiĝis. Ŝi en oficejo de privata entrepreno, dum li restis en la fakultato, kiel asistanto de ĝuste tiu profesoro, kies nomo fleksiĝis kiel gambomalfermanto de lia sanktulino, ke la profesoro estis trapenetrinta ŝin kontraŭ la noto ses.

Li kunlaborus kun la profesoro Selim, la teruranton de la studentoj, kiu nenion sciis pri liaj sentoj. Lun someran tagon, sur la teraso de restoracio, Adnan kaj Shpresa kafumis lastafoje. Ŝi diris al li "ne!": definitive. Tian neadon li ne ekspektis, ĉar li kredis al ŝiaj vortoj, ke post kiam la kondiĉoj maturiĝus, ŝi pripensus pri longviva amo. Ĝuste post tiu rendezuo, li komencis seiluziĝi. Rememoris tutan tiun tempon, plenigitan per sentoj pri ŝi. Rememoris la atendojn ĉe la anguloj de la urbeto, la unuan fojon kiam li parolis kun ŝi, kaj la unuan amvorton kiun li estis dirinta ŝin.

Ĉi tiun lastan tagon, kiam ili restis sidantaj fronte de unu al alia, estis pasintaj ok jaroj kaj kvin monatoj ke li estis donacinta nur ŝin siajn sentojn kaj revojn. Ĝuste tiun tagon la sorĉo okupinta la junulon rompiĝis kaj li konvinkiĝis ke li neniam igus la sian Shpresa-n. Tio ege kolerigis lin, unue al si mem kaj poste al ŝi, kiu, danke al la komunaj eliroj de tempo al tempo, tenis ostaĝon lian spiriton. Li rememoris la vortojn preskaŭ ĉiutagajn de Fahri, ke ŝi bezonis lin, ne pro sentoj, vortoj kiuj tiam ŝajnis lin plej ĝenaj.

Pasis monatoj kaj li ne plu vidis Shpresa-n, ĝiskiam iu tagon, de amikino ŝia, kiun li renkontis hazarde surstrate, li eksciis ke ŝi edziniĝis al ĉefurba ĉarma junulo. Je lia miro, li sentis nenian ĵaluzon, kvazaŭ li ĝojis ke ŝi estis trovinta ŝian vivan sorton. Pasis malpli ol ses monatoj kaj li renkontiĝis kun bluokula ĉefurbanino, kiu, je koincido, havis la nomon Shpresa. Ŝi tro amis Adnan-on kaj ŝia nomo estis spirita balsamo por la perdita tempo.

Lun someran tagon, promenante en la placo kune kun lia laboreja kolego, li vidis la tiaman Shpresa-n, post tri jaroj. Ŝi bonaŭguris lin la edziĝon dum ĉi tiu aldiris nur unu vorton: "Kiom multe mi dezirus ke vi estu anstataŭ ŝin". Ŝi diris nenion, nur ridis iomete kaj salutis lin kaj lian kolegon.

Post ok tagoj ekde la denova kaj hazarda renkontiĝo kun Shpresa, li ricevis fatalan novaĵon de sia amiko, Fahri, la sola kun kiu li dividis la spiritajn kaŝitaĵojn. Ŝi, lia tiama anĝelino, estis flirtante kun sia laboreja kolego, kun kiu li mem estis ŝin konatiginta. La novaĵo eksterordinare kolerigis lin. Longajn tagojn li starigis al si la demandon kiel eblas ke la knabinon kiun, dum ok jaroj li estis revinta kaj ne sukcesis igi la

sian, aperu kelkiu, kiu per nur ok tagoj da klopodado, sukcesu enigi facile en la lito. Tio igis lin krevi pro indigno, koleriĝi kun si mem kaj malami tiun ne korekteblan virinon, ensorĉinta lin per ŝia senkulpa aspekto. Li konkludis ke ŝi estis naskiĝinta por esti nobla, sed memvole estis elektinta fariĝi malĉasta. Tiun malaman senton al Shpresa pliigis ankaŭ profesoro Selim, kun kiu li estis stariginta ian intimecon tre amikan, kiu estis dirinta ke la vortoj cirkulintaj pri lia flirto kun Shpresa estis tute veraj.

Instigite de troa kolero, kvankam konscia, ke li estis farante ion tutan malpuran, li decidis ludi la rolon de observanto kaj investiganto pri ĉi tiu ŝia akto kronorompanta. Dum preskaŭ du monatoj li ne sukcesis pruvi ion, krom iliajn renkontiĝojn en la periferiaj kafejoj, ĝiskiam iun tagon li postsekvis ŝin kaj ekvidis ŝin eniri en malnovan hotelon, troviĝanta ne pli ol du kilometroj de la granda urbo. Li estis tute freneziĝinta, kiam vidis ilin suprenirante la nelavitan

ties ŝtuparon. Ne povis li plu toleri. La indigno, la kolero kaj la malamo al Shpresa kaj ne al sia kolego, venkis ĉe li. Li venĝis je la plej nekredbla maniero. Ĵus ili eniris, li sin direktis al la urbo kaj iris al la homo kiun oni ne devus anonci.

La povrulo kiu amis sian edzinon, tiel spirite kiel la kolerigito, vidis ŝin elirante de la sama pordo, kien la anoncinto estis vidinta ŝin enirante.

Adnan Kastrati, ĉiujare, en ŝia mortotago, turnas la tombon de Shpresa en sia ritualatemplo kaj kiel pia pilgrimanto preĝas al ŝi ke ŝi aŭkultu kaj pardonu lin, sendante kontinue girlandojn kun la surskribo: "Al la knabino al kiu poreterne mi donis la amon kaj la morton".

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

La Papiliego de Raleigh

verkis kaj sendis Maurizio 'Rico' Giacometto el Britujo

Mi bezonis esti iomete sola. Nur dum kelkaj minutoj. Kelkaj minutoj nur por mi mem. Por fermi miajn okulojn kaj pensi, revii, flugi en mian menson. Ne miskomprenu min. Mi ŝatas homojn. Sed unuope, ne en grupoj. Kvankam ĉiuj geamikoj tie en NASK* estis tre agrablaj kaj la etoso estis multe pli ĝuoplena ol mi kredis antaŭ ol alveni al la kurso, kiam alvenis la tempo por la matena lecionpaŭzo, mi decidis elfuĝi sola kaj piediri iomete tra la parko de la universitato.

En eta kaj ombreta angulo de la parko, malantaŭ la ĉefa konstruaĵo, troveblas kurioza benko havanta formon de papilio, tiom granda ke ĝi iomete timigis min, kiam mi unuafoje vidis ĝin. Ĉu insekto? Ĉu konstruaĵo? Ĉu monstro? Ĉu praaŭ de modernaj papilioj iel restinta ekde la prahistorio? Mia imago jam kuregis.

Ĉirkaŭrigardinte por certigi min ke neniu alia estas tie, mi eksidis. Tiam mi aŭdis ĝin. Voĉon. Jes, mi aŭdis voĉon. 'Tiu sono servanta al homo, por esprimi senton aŭ person' tiel PIV** difinas la vorton. 'Al homo'. Sed ne estis iu ajn homo tie. 'Mi vetas, ke vi tute ne antaŭvidis tion, ĉu?' diris la voĉo. 'Kiu parolis?' mi demandis min. 'Kiu parolis?' mi ripetis laŭte. 'Mi ne certas, ĉu mi povas diri' komentis la voĉo. 'Kial ne?' 'Ĉar vi ne kredas je mi. Vi ne vere kredas, ke mi kapablas paroli'.

Reveninte al la kursejo, mi rekomencis mian esperantumadon. Tamen mi ne sukcesis forigi la personon pri tiu voĉo. Kio parolis al mi? Dubo ne ekzistis. La voĉo estis tie. Sed kiu eldiris tiujn vortojn?

Unu tagon poste, pli-malpli je la sama horo, mi

trovis min ĉe la sama eta kaj ombreta loko. 'Ĉu vi aŭdas min nun?' diris la papiliego. 'Jes' mi aŭdis min diri. 'Nenio ŝanĝiĝis ekde hieraŭ' diris la papiliego. 'Nur la fakto, ke vi nun kredas tion. Mi scipovis la homparoladon hieraŭ kaj mi scipovas ĝin hodiaŭ. La sola afero, kiun vi ŝanĝis, estas via kredo pri tio'.

Mi eksidis sur la benkon por ekmanĝi mian sandviĉon. Vere dirite, la benkon mi taksis tute malkomforta pro manko de dorsapogilo. Tamen, mi ne havis tempon por sperti tian malkomforton ĉar la papiliego diris al mi: 'Ĉu vi deziras flugi super la universitato kaj la urbo de Raleigh? Vasta kaj belega panoramo prezentiĝas de tie supre'.

'Benkoj ne scipovas flugi', mi elbuŝigis arogante. 'Ĉu vere?' venis la senverva respondo.

'Ĉiuokaze, mi ne estas benko. Mi estas papiliego. Bedaŭrinde, vi ne kredas je mi. Vi ne vere kredas, ke mi estas papilio aŭ ke mi scipovas flugi. Ĉu vi ankoraŭ kredas, ke mi kapablas paroli?'

'Jes...', diris mi konfuzite.

'Do, se vi scias, ke mi estas papiliego, se vi kredas ke mi povas paroli, kiam vi kredos, ke mi scipovas flugi, vi rajtos flugi per mi'.

Reveninte al la kursejo mi rekomencis mian esperantumadon. Tamen mi ne sukcesis forigi la personon pri tiu papiliego. Kial ĝi parolis al mi? Kion signifis tiuj vortoj? Dubo ne ekzistis. Ĝi diris, ke mi 'rajtos per ĝi flugi' nur 'kiam' mi kredos ke ĝi scipovas flugi. La voĉo estis tie. Sed kial ĝi eldiris tiujn vortojn?

Unu tagon poste, pli-malpli je la sama horo, mi





trovis min denove ĉe la sama eta kaj ombreta loko.

‘Ĉu vi volas flugi nun?’ diris la papiliego. ‘Jes’ estis mia respondo. ‘Nenio ŝanĝiĝis ekde hieraŭ’ diris la papiliego. ‘Nur la fakto, ke vi nun kredas tion. Mi scipovis flugi hieraŭ kaj mi scipovas flugi hodiaŭ. La sola afero, kiun vi ŝanĝis, estas via kredo pri tio’.

‘Ek!’ ĝi ekkriis. ‘Ni flugu!’ ‘Sed vi estas iomete malkomforta ĉar vi ne posedas dorsapogilon...’, mi respondis timeme. “Dorsapogilo? Ne diru sensencaĵojn, turnu vin kaj tenu miajn flugilojn per viaj manoj!’ Mi faris tion kaj tuj poste ni estis flugantaj tra la verdaj folioj de la arboj, apud la brunaj brikoj de la proksimaj konstruaĵoj, super la grizaj tegmentoj de la kolegio kaj de la urbo. Estis mirinda pejzaĝo. Mi povis vidi la tutan urbon kaj la ĉirkaŭaĵojn. Mi ĵuras, ke mi povis eĉ vidi la maron en la foreco. Ĉu ni eble povos iun tagon, iam, finvenki la timon flugi per stranga verda papiliego kaj finfine flugi ĝis tia bela paca maro? Ĉu multaj, eĉ ĉiuj, aliaj homoj povos fari same? Oni povus diri, ke mi estis sendorme sonĝanta, kun ne fermitaj okuloj.

Mi vidis Michael, Chuck kaj Tim. Iomete pli for mi vidis Rafan, Hoĉjon kaj Annan en vigla diskutado kun Renato pri io. Eĉ pli for videblis Malcolm, Tomason kaj Alex. Ili diskutis kun virino. Ŝi surhavis verdan pantalonon kaj ĉemizon kun grandegaj 'N'-literoj fronte kaj malfronte. Ŝian vizaĝon mi ne povis vidi, sed iel mi certis ke mi konas ŝin.

Kiam ni surteriĝis, la unua penso en mia menso estis prezenti la papiliegon al ĉiuj, por ke ili povu konstati kiel ĝi bone komunikas kaj flugas kaj kiel ĝi povus flugigi iun ajn al ĉiuj partoj de la mondo. Mi sentis min plena de entuziasmo. Tiu sento fortigis min kaj mi volis preparoli tion kun iu ajn, ĉu partoprenanto en la kurso, ĉu ne. Mi estis kiel infano, kiu ĵus spektis novan filmon pri sia preferata superheroo kaj volas rakonti la tutan filmon al ĉiuj. Mi bedaŭris, tamen, ke kiam mi ekparolis al iu, neniun sonon mi sukcesis elbuŝigi. Ĉu mi ĵus mutiĝis? Neniu povis aŭdi min. Ĉu

ili ĵus surdiĝis?

Preskaŭ leginte mian menson, la papiliego diris al mi: “Ili ne surdiĝis. Mi scias, ke ili kapablas tre bone aŭdi. Sed ili ne povas aŭdi vin.”

“Kial?” mi demandis.

“Vi scias, ke mi estas papiliego. Vi scias ke mi kapablas paroli la homan lingvon. Vi scias, ke mi scipovas flugigi vin, sed nur kiam vi certas ke mi kapablas flugigi ĉiujn ajn homojn al ajn landoj, vi kapablos paroli pri tio al ili kaj ili povos aŭdi vin. Nenio alia bezonas ŝanĝiĝi. La sola afero, kiun vi devas ŝanĝi, estas via kredo pri tio.

‘Ne gravas, ke ili ne kapablas aŭdi vin nun’ - daŭrigis la papiliego sian paroladon. Tio, kio gravas, estas ke ili ĉiuj lernas pri la ekzisto de ni papiliegoj, pri nia fluglerteco kaj pri niaj kapabloj flugigi homojn kaj alproksimigi unujn al la aliaj. Ju pli da homoj lernas tion, des pli bone ni povos flugi. Kiam sufiĉe da homoj scios pri tio, ili lernos ke ni ankaŭ povas flugigi homojn ne simple super urbo sed super ĉiuj urboj, eĉ super la urboj en la tuta mondo. Eĉ ĝis la maro. Tia bela, paca maro.’

‘Estas multaj papiliegoj en la loko de kie mi venis. Al homoj kiuj ne atenteme rigardas, tiu loko aspektas ja kiel eta kaj ombreta loko, sed ĝi vere estas multe pli granda ol ĝi aspektas kiam vi unufoje trovas ĝin. Kiam sufiĉe da homoj vere komprenos, ke papiliegoj kapablas flugi, tiam multaj el ni estos pretaj helpi ilin - ne nur la papiliego de Raleigh.’

**NASK estas la Nord-Amerika Somera Kursaro, kiu okazas ĉiujare ekde 1969 en Usono. Ĝi estas Esperanto-plena semajno, kie komencantoj, komencintoj kaj progresantoj povas ĉeesti ĉiunivelajn kursojn por plibonigi sian kapablon pri la internacia lingvo. Dum la pasintaj jaroj, NASK okazis en Raleigh, Nord-Karolino. **PIV Plena Ilustrita Vortaro (de Esperanto). vortaro.net estas la reta versio de tiu verko, unu el la plej famaj E-verkoj de lastaj jardekoj "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (PIV) unue aperis en la jaro 1970.*

verkis kaj sendis **Maurizio ‘Rico’ Giacometto** el Britujo

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsédžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilnusia universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**
el *Litovio*

-- oOo --

Antaŭ longa tempo ia pastro veturis en urbon kaj haltis en vilaĝo por nutri la ĉevalojn. Dum la koĉero ĉion priordigadis, la pastro iris en la domon, starantan ĉevoje. Vidas li, ke neniu enestas krom eta infaneto kuranta sur la planko.

- Estu adorata Jesuo Kristo, - diras la pastro.
- Dum jarcentoj eternaj! – respondas infaneto, malgranda, kiel fabplanta garbeto. - Bonvolu sidiĝi kaj ripozi.

Sidiĝis la pastro kaj demandas la knabon:

- Laŭ sia aĝo vi aspektas tre prudenta, bubo. Sed diru al mi, kie estas via patro.
- Paĉjo eliris kun la malplimulto por serĉi plimulton.
- Kaj via patrino?
- La patrino manĝitan panon bakas.
- Nu, kaj via fratino? – daŭre demandadas la pastro.
- La fratino en la lignoamaso kvazaŭ vipero siblas.
- Kaj eble vi ankaŭ havas fraton?
- Certe, sed li helbrunan reton trikas.

La pastro balancigas sian kapon kaj neniel povas percepti, kion la infanaj vortoj signifas. Li nur komprenas, ke li estas lertulo neniam antaŭe renkontita.

- Ege prudenta estis via parolo, bubeto, do ekspliku nun, kia estas la senso de via diraĵo, ke via patro serĉas por plimulto kune kun malplimulto.

- Ĉu vere vi ne komprenis, kara pastro? Li ja eliris por semi sekalojn.

- Kaj kian manĝitan panon vis patrino bakas?
- Tre simpla afero: kiam ni ekmankas panon, mia patrino prunteprenas ĝin el la najbaroj. Kiam ni bakas ĝin, ni redonas la ŝuldon, kaj ni ree havas nenion manĝeblan.

- Vi diris, ke via fratino en la lignoamaso kvazaŭ vipero siblas.

- Ŝi teksas sidante en la stablo.

- Kaj kian reton via frato trikas?

- Li konstruas fornon en la banejo.

Eksilentis la pastro mirigita per la infana prudento kaj ree ekparolis;

- Filĉjo, ĉu vi ne povus al mi montri la vojon en la urbon?

- Kial ne, kara pastro? Se vi volas finveturi hodiaŭ, veturu ronde, kaj se vi deziras akiri la celon morgaŭ, veturu rekte.

La pastro ree ne povas percepti, kion la knabo parolas.

- Ĉu vi ne eraras tiel parolante? Ŝajnas tute ne simile, ke veturante rekte mi perdus pli multe da tempo.

- Sed tio estas vero, kara pastro. Veturante rekte vi devos penetradi tra arbustoj kaj malglataĵoj. Via kaleŝo rompiĝos, kaj ĝis kiam ĝi estos mendita, la morgaŭo venos. Kaj la ronda vojo estas multe pli bona kaj vi eblos pli baldaŭe alveturi.

La pastro kruccsignis la infaneton, benis lin kaj forveturis pensante: "Tiel malgranda, sed jen kia spritulo. Verŝajne plenkreskinta li ekestos eĉ pli sprita.

La infaneto kreskis kaj atingis sian junecon. Ĉiuj miregis lian saĝon kaj prudenton. Ekaŭdis pri tio sinjoro kaj tre ekkoleriĝis. Kiu povus imagi, ke ordinara vilaĝano estu pli prudenta ol bojaroj!

Unufoje ekvidis la sinjoro, ke la junulo portas tri anserojn kaj barigis lian vojon.

- Aŭskultu, kamparanaĉo, donu al mi tiujn anserojn. Ĉu decas al ordinara homo manĝi ilin?

- Mi povas vendi ilin, sed ne fordoni, - respondis la junulo.

- Tia penso eĉ ne troviĝas en mia kapo, - rikanas la sinjoro. – Se vi ne fordonos libervole, mi forprenos ilin perforte. Hej, servistoj!

Alkuregis la servistoj al la junulo kaj forprenis la anserojn.

- Nu, sinjoro, - li diras, - vi rememoros min trifoje pro tiuj-ĉi anseroj.

- Sentaŭgulaĉo, - ridas la sinjoro. – Vi signifas nenion al mi.

Pasis duonjaro, la junulo ŝminkis sian vizaĝon por ke la sinjoro ne rekonu lin kaj simulante arbohakiston, li iris en la bienon. Renkontinte la sinjoron li diras:

- Mi estas ĉarpentisto kaj mi scipovas ĉiujn lignolaborojn. Mi aŭdis, ke la sinjoro intencas konstrui novan palacon.

- Ho, kiel ĝustatempe vi trafis ŝalveni, - ĝojas la sinjoro. – Mi vere intencas konstrui. – Kaj kian pagon pro la laboro vi deziras?

- Mi ne povas diri, sinjoro, nevidinte la arbojn. Eble ni veturu por rigardi ilin, kaj poste ni jam findecidos pri

la pago.

Veturis ambaŭ en la sinjoran arbaron kaj elkaleŝiĝinte iras kune kun la servistoj inspekti la arbojn. Tuj kiam ili atingis arbodensaĵon, kaptis la junulo la sinjoron je la kolo eltiris el sub la mantelo knuton kaj vipis lin tiom, ke tiu apenaŭ vivteninte rampis al la kaleŝo.

Post la vipado la sinjoro bonege memoris la junulon kaj la anserojn, sed li pensis:

„Vi instruis min unufoje, sed mi certe estos pli singardema estontece.“

Pasis unu jaro kaj la lertulo, aĉetinte belegan ĉevalon, rajdadas sub la sinjoraj fenestroj. Nun li ŝajnis riĉan komerciston, unufoje veninta en la landon. Ekvidis la sinjoro nekonatan eksterlandanon kaj lian belegan ĉevalon, kaj tiel ekdeziris ekhavi ĝin, ke pri nenio plu ne povas pensi. Li sendis serviston por demandi, ĉu la eksterlandano ne emas vendi la ĉevalon.

- Kial ne! – respondis la eksterlandano.

Spertinte lian opinion, la sinjoro elkuris por marĉandi pri la kosto.

- Bone, - diras la junulo. – Via servisto provu la ĉevalon kaj ni dume ĉion pritaksos.

Tuj kiam la servisto forrajdis, la junulo kaptis la sinjoron je la kolo kaj ekvipis lin ĉiufanke. Kiam la servisto alrajdis, li tuj enseliĝis kaj forrajdegis, lasinte la sinjoron plorantan kaj ĝemantan.

- Ĉio-ĉi, kara sinjoro, helpos al vi rememori min la duan fojon.

Nu, la sinjoro tiel bone rememoris lin, ke estis tute maleble forgesi. Li kuŝas enlite por unu, du semajnoj

kaj neniel ellitiĝi povas.

Kaj la junulo surmetis longan mantelon, surnazigis okulvitrojn, kaj ŝajnigante doktoron, venis al la palaco. Alvenis kaj diras:

- Eble la sinjoro bezonas doktoron?

- Certe, - respondis servisto, - tamen nia sinjoro timas ĉiujn. Nun tage kaj nokte li estas gardata per kelkaj servistoj.

- Nu, ili ne ĝenos min. Ili gardu, kaj mi sanigos la sinjoron, ne servistojn.

Kiam la sinjoro ekvidis tian prudentan doktoron, li tuj konsentis, ke li eku la sanigadon.

- Por ke la sanigilo bone funkciu, ĝi devas esti akceptata en la banejo kaj poste formetinte ĉiujn vestaĵojn, oni devas varmiĝi tute nuda.

La sinjoro pensis iel, pensis aliel kaj decidis esti sanigata. La gardistoj portis line n la banejon, sed la doktoro, irante malantaŭe, ŝovis braĝeton en la tegmenton de la stalo. Forvestiĝis la sinjoro kaj atendas por la sanigilo, kaj tiatempe iu ekkriis:

- Incendio! Incendio!

La gardistoj elkuris por rigardi, kio okazis. Ekvidinte la brulantan stalon, ĉiuj entreprenis pri ĝia estingado. Dume la junulo kaptis la submantele kaŝitan vipon, kaj tiel vipis la sinjoron, ke tiu postrestis apenaŭ viva. Ĝis kiam la servistoj revenis, eĉ la junulaj piedsignoj jam estis malvarmiĝintaj.

- Nun, kara sinjoro, ĉiuj-ĉi tri rememoroj sufiĉos al vi por via tuta vivo.

Instruita de la lertulo, la sinjoro jam neniam ekdeziradis fremdajn anasojn.

MAJO

tradukis kaj sendis Roland Platteau el Francio

Majo

Majo rida majo sur Rejn' en boato
Belaj sinjorinoj rigardis de monto
Tiome belas vi boato glitas for
Kial je l'salikoj venis tioma plor'

Senmoviĝis foren fruktarboj florantaj
Petaloj falintaj de la arboj majaj
De ŝi kiun amis mi jen estas ungoj
Petaloj velkintaj de ŝi la palpebroj

Lante sur bord' sur voj' paŝis laŭlonge river'
Urso hundo simi' en ciganirantar'
Azenotiritan ruldomon sekvantaj
Dum flue foriris en vitkampoj Rejnaj
Surfifre luditaj arioj armeaj

Majo rida majo ornamis ruinojn
Per heder' per rozuj' per floroj abunde
Agitas vimenojn Rejna vent' surborde
Parolemajn junkojn kaj vitflorojn nudajn

Wilhelmo Apollinaire - « Alkoholaĵoj »

Rimarko: Apollinaire neniam uzas interpunkciojn

esperantigis **Roland Platteau** el Francio

4/5/2004

el la poemkolekto « En la lumoj de la ekmiroj »

eldono de MAS



HISTORIOJ PRI SINJORO KOJNO

(parto 1)

*rakonto de Berto Breĥto **

Saĝa ĉe saĝulo estas la sinteno

Al sinjoro K. venis filozofia profesoro kaj al li rakontis pri sia saĝo. Post iom da tempo sinjoro K. diris al li: Vi sidas malkomforte, vi parolas malkomforte, vi pensas malkomforte. La filozofa profesoro koleriĝis kaj diris: Mi volis iom ekscii ne pri mi, sed pri la enhavo de tio, kion mi diris. Ĝi ne havas enhavon, diris sinjoro K. Mi vidas vin iri mallerte, kaj ne estas celo, kiun vi, dum mi vidas vin iradi, atingas. Vi parolas malhele, kaj ne estas helo, kion vi parolante kreas. Vidante vian sintenon, ne interesas min via celo.

Organizo

Sinjoro K. foje diris: La pensanto uzas nenian lumon tro, nenian panpecon tro, nenian penson tro.

Disponoj kontraŭ la potenco

Kiam sinjoro Kojno, la pensanto, en salonego antaŭ multaj homoj esprimis sin kontraŭ la potenco, li rimarkis, kiel la homoj antaŭ li recedis kaj foriris. Li retrorigardis kaj vidis malantaŭ si stari - la potencon.

Kion vi diris? demandis lin la potenco.

Mi esprimis min por la potenco, respondis sinjoro Kojno.

Kiam sinjoro Kojno estis foririnta, liaj disĉiploj demandis lin pri lia vertebraro. Sinjoro Kojno respondis: Mi ne havas vertebraron por disbati. Ĝuste mi devas vivi pli longe ol la potenco.

Kaj sinjoro Kojno rakontis jenan historion:

En la loĝejon de sinjoro Erpo, kiu estis lerninta diri ne, iun tagon dum la tempo de la eksterleĝeco venis agento, kiu montris paperon, kiu estis skribita nome de tiuj, kiuj regis la urbon, kaj en kiu estis atestita, ke al ĝia posedanto apartenu ĉiu loĝejo, en kiun li metas sian piedon; same ankaŭ ĉiu manĝaĵo apartenu al li, kiun li postulas; same ĉiu homo al li servu, kiun li vidas.

La agento ekvidis en seĝon, postulis manĝon, sin lavis, kuŝiĝis kaj demandis, la vizaĝon al muro, antaŭ ol ekdormi: Ĉu vi servos al mi?

Sinjoro Erpo lin kovris per kovrilo, forpelis la muŝojn, gardis lian dormon, kaj kiel dum tiu tago li obeis al li dum sep jaroj. Sed kion ajn li faris por li, ion li bone gardis sin fari: tio estis, diri eĉ vorton. Kiam

nun estis pasintaj la sep jaroj kaj la agento dikiĝinta pro multaj manĝo, dormo kaj ordono, la agento mortis. Tiam sinjoro Erpo volvis lin en la aĉigitan kovrilon, trenis lin for el la domo, lavis la kuŝejon, surkalkis la murojn, profunke enspiris kaj respondis: Ne.



Pri la portantoj de la scio

Kiu portas la scion, tiu ne rajtas lukti; nek diri la veron; nek fari servon; nek manĝi; nek rifuzi honorigojn; nek esti konebla. Kiu portas la scion, havas el ĉiuj virtoj nur unu: ke li portas la scion, diris sinjoro Kojno.

La celservanto

Sinjoro K. faris jenajn demandojn:

Ĉiun matenon mia najbaro aŭdigas muzikon per gramofona kesto. Kial li faras muzikon? Mi aŭdas, ĉar li gimnastikas. Kial li gimnastikas? Ĉar li bezonas forton, mi aŭdas. Kiucele li bezonas forton? Ĉar li devas venki siajn malamikojn en la urbo, diras li. Kial li devas venki malamikojn? Ĉar li volas manĝi, aŭdas mi.

Post kiam sinjoro K. tion estis aŭdinta, ke lia najbaro faras muzikon por gimnastiki, gimnastikas por esti forta, volas esti forta por mortbati siajn malamikojn, mortbatis siajn malamikojn por manĝi, li faris sian demandon: Kial li manĝas?

Peno de la plejbonuloj


Pri kio vi laboras? estis demantita sinjoro K. Sinjoro K. respondis: Mi havas multe da peno, mi preparas mian sekvontan eraron.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/kojno.html>

* Bertolt Breĥto (Eugen Berthold Friedrich Brecht; (1898 Augsburg - 1956 Berlino) estis germana verkisto, dramisto kaj reĝisoro, li havis komunismajn idealojn.





Saluton,


En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli


Alan Turing (1912–1954) kaj John Searle (1932-)

Ĉu komputiloj povas pensi?

Pensu, ke via devo estas sidi ĉe tablo en ĉambro sur kies pordo estas leterfendo. Sur la tablo troviĝas libro kaj amaso da kartoj kun simboloj. De tempo al tempo oni enĵetas karton sur kiu estas ĉina litersimbolo, vi serĉas la simbolon en la libro en tabulo, kie apud la simbolo en la dua kolumno de la tabulo estas alia simbolo. Ĉi tiun vi serĉas en la amaso de kartoj kaj poste vi elĵetas ĝin el la leterfendo. Vi ne scias pro kio vi faras ĉi tiun laboron kaj vi scivolemas. Ĉi tiu estas la “ĉina ĉambro” imaga eksperimento de filozofo **John Searle** por montri, ke komputiloj ne povas pensi.



Por kompreni tiun eksperimenton vi devas kompreni la “*Turing eksperimenton*” de **Alan Turing**. Turing diplomiĝis el Kembriĝo en Anglujo, kaj dum la dua mondmilito li inventis maŝinon kiu kapablis fari malfacilajn komputadojn. Per tiu maŝino la angla armeo sukcesis malkovri la german-armeajn “Enigma” kodojn kaj tiel decifri la germanajn mesaĝojn kaj lerni pri iliaj planoj. Alan Turing en 1950 inventis la “Turing eksperimenton” pere de kiu oni povus testi ĉu iu maŝino havas la kapablon fari pli ol simplaj kalkuladoj kaj fariĝi iasence inteligenta.



Tio, kio estas interesa pri nia cerbo, ne estas ĝia griza, mola kaj tremanta aspekto sed ĝia funkciado. Komputiloj povas esti metalaj kaj malmolaj tamen ili povas fari almenaŭ parte multon, kion nia cerbo faras. Por kompreni la inteligentecon de homo, ni ne rigardas al lia cerbo sed al liaj respondoj por diversaj demandoj. Do, por taksu la komputilojn ni devas enfokusiĝi al tiaj eksteraj evidentaĵoj. Por esti justa pri

la taksado, nin devas okuopi nur la “enigaĵoj” kaj “eligaĵoj” de tiuj maŝinoj. Do, pensu pri homo kiu sidas en ĉambro, skribas demandon sur ekranon kaj ricevas respondon. Se li ne povas taksu, ĉu tiu respondo elvenis el homo aŭ el komputilo, tiam la komputilo havas almenaŭ parte la funkciadon de homa cerbo kaj jam pasis la Turing eksperimenton.

Kontraŭe la “ĉina ĉambro eksperimento” provas montri, ke kvankam iu komputilo pasis la “Turing eksperimenton”, tio ne signifas, ke ĝi havas la funkcion de homa cerbo. La komputilo ne povas kompreni kaj do taksu pro kio ĝi faras tiun laboron. Ili ne scipovas la ĉinan lingvon tamen ili povas respondi ĉine. Do malgraŭ la “Turing eksperimento” ĝi ne estas inteligenta. La programisto enigis komputilan programon de serio de instrukcioj kaj ili fidele sekvas tiujn instrukciojn. Tamen en ĝi ne troviĝas “semantiko”¹. Kiam homoj parolas ili metas signifon al tio, kion ili parolas. La papagoj imitas nian paroladon sed ne komprenas tion, kion ili elparolas. Nur el “sintakso”² oni ne povas atingi “semantikon”.

Tamen la homo kiu troviĝas en la “ĉina ĉambro” estas parto de la tuta sistemo, kaj li povas almenaŭ kompreni parton de tio, kion li faras. Searle ŝanĝis iomete sian eksperimenton, kaj pensis pri homo kiu parkerigis la tutan libron kaj kiu povas respondi ĝuste al la ĉinaj litersimboloj montritaj al li. Tamen, kompreni estas pli ol doni la ĝustan respondon.

Kelkaj filozofoj jam pensas, ke la homa cerbo fakte estas simila al la funkciado de komputiloj. Do ili kredas, ke komputiloj estas inteligentaj kaj povas pensi. Se tio estas vera kaj via cerbo estas sintakso de komandoj, tiam, iam la homa cerbo eble povos esti transigita en komputilon kaj ĝi funkcios tie same kiel en via kranio. Kvankam ne agrabla vivmaniero, ĉu tio signifas, ke postmorte via cerbo daŭrigos ĝian funkciadon kaj pensadon kaj vi ŝajne vivos?

Laŭ Searle ne, sed laŭ Turing jes. Laŭ Turing en la estonteco komputiloj eble eĉ povos filozofii.

¹ **semantik/o** Scienco, studanta la signifojn de la diversaj unuoj de lingvo (morfemoj, frazoj k.a.)

² **sintaks/o** Parto de la gramatiko, kiu priskribas la regulojn de kombiniĝo de la diversaj lingvaj unuoj.

.(daŭrigota)

Ŝercoj



Telefonalvoko:

- Hallo! Mi vokis vin por demando: Ĉu vi fariĝos mia edzino?

- Jes ! Tre volonte! Sed kiu parolas tie?

* * *

- Paĉjo, ĉu via patrino batis vin ?

- Ne, kara filo. Nur via

* * *

- Filĉjo, fermu la fenestron, estas malvarme ekstere!

- Panjo, sed... se mi fermos la fenestron, ĉu tio varmigos la veteron?

* * *

Du amikinoj.

- Mia edzo adultas! Kion mi devas fari?

- Vi devas esti atentema por ke vi ne renkonti lin ĉi tie.

DAMNINDAJ BESTKURACISTOJ !!
VI ENIRAS HUNDO
KAJ VI ELIRAS PIEDLAMO...



Apkias

Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj



KRIPTA FRAZO

Rekonstruu proverbon (3, 4, 7, 3, 7)
interligante apudajn literojn ekde K al N
horizontale, vertikale aŭ diagonale..

Fonto: Semajno de Enigmoj #3

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la lasta paĝo)

K	I	U	L	A	O
S	M	A	U	B	R
A	H	R	N	M	O
O	N	O	O	A	N

EKZEMPLO

Patro nia,
kiu estas ...

A	P	A	S
T	T	A	K
R	I	S	I
O	N	E	U

Du rekomendindaj retejoj

-- el revuo "Lampiro" el Brazilo

kern.punkto.info

Temas pri kolekto da podkasto de paro da geesperantistoj, kiuj interparolas pri elektitaj temoj. Kelkaj ekzemploj: "Berlina Muro", "Mapoj mensogas", "Nuklea Energio". La registraĵoj daŭras mezume unu horon, dum kiuj la parolistoj bonhumore, vigle, inteligente parolas inter si. Foje, ili akceptas specialan invititon, ĝenerale fakulon pri la pritraktata temo. La informoj estas interesaj, la babilado entuziasma, la uzado de la lingvo estas tute flua, la sonado plej ofte klara. De tempo al tempo aperas novaj podkasto.

Taŭga por kleriĝo kaj praktikado de la lingvo per aŭskultado.

verkoj.com

La retejo proponas signifoplenan devizon: "Esperanto ne estas nur lingvo. Esperanto estas kulturo." Por tio ĝi proponas senpagan aliron al kolekto da variaj literaturaĵoj. Ili estas originalaj kaj tradukitaj prozaĵoj, poemoj, anekdotoj, bildstrioj, infanlibroj kaj informoj pri Esperanto en pluraj lingvoj. Kaj ĝi proponas, ke verkistoj kontribuu per siaj propraj tekstoj.

Fonto: Lampiro #153 2018:5

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Ili sin banis, brosis siajn vestojn, rapidis al la pordo. Nikolaj Aleksandroviĉ kaj lia edzino sekvis ilin malrapide, pli pene, sed ankaŭ ilin voris la soifo por libereco kaj aero.

Sur la sojlo Nikolaj Aleksandroviĉ sin returnis. Lulu estis malŝaltinta la lumon. Ili estis forgesintaj Tatjanan Ivanovnan, kiu sidis antaŭ la fenestro. La lumo de gazlampo lokita antaŭ la eta balkono lumigis ŝian klinitan kapon. Ŝi restis senmova kaj ŝajnis atendi.

Nikolaj Aleksandroviĉ demandis:

"Ĉu vi iros kun ni, Njanjuŝka?"

Ŝi ne respondis.

"Ĉu vi malsatas?"

Ŝi skuis la kapon kaj abrupte stariĝis, nerve interplektis la franĝojn de sia ŝalo.

"Ĉu mi elpaku la valizojn de la infanoj? Kiam ni ree foriros?"

"Sed ni estas alvenintaj" diris Nikolaj Aleksandroviĉ.

"Kial vi volas reforiri?"

"Mi ne scias" ŝi murmuris kun iu distrita kaj laca mieno, "mi opiniis..."

Ŝi suspiris, malfermis la brakojn kaj mallaŭtvoĉe diris: "Estas bone."

"Ĉu vi volas iri kun ni?"

"Ne, dankon, Helena Vasiljevna" ŝi penis respondi, "ne, vere ne..."

Oni aŭdis la infanojn kuri en la koridoro.

La maljunuloj rigardis unu la alian senvorte kaj suspirante, kaj Helena Vasiljevna lace mangestis, eliris, kaj post ŝi Nikolaj Aleksandroviĉ foriris, dolĉe refermante la pordon.

Kvina Ĉapitro

Komence de la somero, la Karinoj alvenis al Parizo kaj luis etan meblitan loĝejon, en strato de la Triumfa Arko.

En tiu tempo, Parizon invadis la unua fluado de rusaj migrantoj, kaj ĉiuj amasiĝis en Passy kaj en la ĉirkaŭo de la Placo de l' Stelo, instinkte proksimiĝante al la Bosko de Boulogne.



Tiun jaron, la varmego estis prema.

La loĝejo estis malvasta, malluma, sufoka.

Ĝi odoris je polvo kaj malnovaj ŝtofoj; la malaltaj plafonoj ŝajnis pezi sur la kapojn.

De la fenestroj videblis la korto mallarĝa kaj profunda, kun kalkitaj muroj, kiuj kruele resendis la julian sunlumon.

Jam matene oni fermis la ŝutrojn kaj la fenestrojn, kaj en tiuj kvar etaj mallumaj ĉambroj la Karinoj kune vivis ĝis la vespero, sen eliri, mirigitaj de la Parizaj bruoj, spirante kun ĝeno la odoraĉojn de la lavuoj kaj kuirejoj, kiuj suprenvenis el la korto.

Ili senvorte iris kaj reiris de unu muro al alia, kiel la aŭtunaj muŝoj lacaj kaj nervozaj — kiam finiĝis la varmego, la lumego kaj la somero — pene flugantaj al la vitroj, trenante siajn mortintajn flugilojn.

Sidante la tutan tagon en la eta tolaĵejo funde de la loĝejo, Tatjana Ivanovna flikis la vestojn.

La "ĉiofaranta" servistino, ruĝa kaj freŝa normanda fraŭlino, peza kiel tirĉevalo, foje malfermetis la pordon kaj ekkriis: "Ĉu vi ne enuas?", opiniante, ke, same kiel la surduloj, tiu fremdulino pli bone komprenos parolojn forte eldiratajn. Kaj ŝia laŭtega voĉo tremetigis la lumŝirmilon de la porcelana lampo.

Tatjana Ivanovna svage skuis la kapon, kaj la servistino ree ekmovetis la kaserolojn.

Andreon oni metis en pensionon ĉe la marbordo, en Bretonio.

Iom poste, Cirilo foriris. Li estis retrovinta sian karcero-kamaradinon, la francan aktorinon malliberigitan kun li en Sankt-Peterburgo en 1918. Ŝi estis nun riĉe vivtenata amorantino. Beleta fraŭlino kaj donacema blondulino kun bela peza korpo, ŝi freneze amis Cirilon...

Tio simpligis la vivon.

Sed reveninte hejmen je la tagiĝo, foje okazis, ke li rigardis la korton sub siaj fenestroj kun la deziro kuŝiĝi sur tiuj rozkoloraj pavimoj kaj definitive liberiĝi de amo, de mono kaj de iliaj komplikaĵoj.

(daŭrigota)


tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

Jen digna Kuirist', la majstro de la art',
 Drinkejon venis laŭ hazard'
 /Li en pieco gardis akuraton,
 Funebris li en tiu tag' bofraton/
 Kaj por la kontraŭmusa gard'
 Restigis li la Katon.
 Sed kion vidas li post ia reven'?'
 De kuk' restaĵon; kaj la Kato mem
 Sidante ĉe barelo kun aĉeto
 Formanĝas en murmur' kokidon en kvieto.
 "Vi, manĝegulo, kaj krimul!"
 La Kuirist' riproĉas kun malŝato:
 "Ĉu vin ne frapas honto kvazaŭ brul'?"
 /Kaj dume maĉas la kokidon Kato/.
 Honesta Kato estis vi ĝis nun,
 Ekzemplo estis vi ĝis nun,
 Kaj jen... Ho, kia estas maifortun'!
 Pri vi najbaroj diros kun atesto:
 Fripono estas Kat', ŝtelisto kaj pirat'!
 De la restaĵoj kaj de supo
 Ni pelu lin el korto sen kompat',
 Ja kvazaŭ estus li malnobla lupu.
 Li estas pest', ulcero estas Kat'! "

/Aŭskultas tion Kato dum manĝad'/.
 La Kuiristo estis oratoro,
 Edifis li abunde kun fervoro,
 Kaj dum ripetis li patose sin
 Formanĝis Kat' kokidon ĝis' la fin'.
 Konsilus mi al kuiristo ajna
 Surmure noti por efik':
 Ne babilaĉu kun minaco ŝajna
 En kazo de potenc-aplik'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)

Ukrainio



El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (32)

DUA PARTO - LA VIVO

57



**Por estri la ŝtaton oni bezonas regarton,
 por la armila metio oni bezonas
 eksterordinaran talenton.
 Sed por gajni la mondon
 oni devas esti libera de agademo.
 Kiel mi scias tion, ke tiel estas pri la mondo?
 Ju pli da aferoj estas en la mondo,
 kiujn oni ne rajtas fari,
 des pli povriĝas la popolo.
 Ju pli la homoj havas akrajn ilojn,
 des pli domo kaj ŝtato malboniĝas.
 Ju pli la homoj flegas arton kaj ruzon,
 des pli leviĝas malbonaŭguraj signoj.
 Ju pli da leĝoj kaj ordonoj pompas,
 des pli estas ŝtelistoj kaj rabistoj.
 Tial parolas la saĝulo:
 Se ni faras nenion,
 tiukaze ŝanĝiĝos la popolo per si mem.
 Se ni amas la kvieton,
 la popolo per si mem fariĝos laŭorda.
 Se ni entreprenas nenion,
 la popolo fariĝos per si mem riĉa.**

**Se ni avidas nenion,
 la popolo per si mem fariĝos simplanima.**

Rimarkoj de Anniespera:

"Regarto" estas nepreciza vorto, ĉar en la originala teksto troviĝas tiu vorto, t.e "zheng" (fonetike), kiu signifas "normala maniero".

"Eksterordinara talento" ne estas tre fidela al la originalo, ĉar en ĝi temas pri maniero, metodo, arto, sed ne pri talento mem.

Vd. de Wang Chongfang:

"La regno devas esti regata en normala maniero, La milito devas esti kondukata per eksterkutima taktiko,"

"Qi wu" (fonetike) en originalo ne signifas "malbonaŭguraj signoj", sed "strangaĵoj".

Vd. de Wang Chongfang:

"Des pli da strangaĵoj estas inventitaj."

"Zi hua" en la originalo, ankaŭ laŭ Wang Chongfang ne signifas "ŝanĝiĝos", sed "spontanee submetiĝas".

(daŭrigota)

En la fabloj, vulpo ĝuste enkorpiĝas la saĝon. Kvankam multaj legantoj havas la antaŭjuĝon pri vulpo en la fabloj de Ezopo, mi deziras ankoraŭfoje prezenti vulpon ĉar mi volas surscenigi ĝin kiel ĉefulo en mia libro.

La vulpo estas supozita kiel mezaĝulo. Se li estus juna, artifikemo ankoraŭ ne elkreskus. Fakte kiam li estis juna, li ofte hontis pro lia juneco. Li naskiĝis malriĉe, kaj ĉagreniĝis pro malriĉeco, lernokariero, kaj devena komplekso. Tamen kaŝante ilin, li ĉiam estis bonhumora, gaja, kaj societema. Oni rigardis lin kiel kompreneman, afablan, kaj prudentan junulon.

Zeŭso ankaŭ pensis tiel. "La vulpo povus fari kiel la reĝo de bestoj. Kvankam li estas malforta, li povus kompletigi tion per lia prudento." Zeŭso decidis inviti kaj regali la vulpon. Zeŭso volis juĝi detale lian personecon kaj distingpovon. La vulpo ekstaziĝis. Ĉar la inĝenia vulpo eminentas en juĝo kaj analizo de situacioj, li konis kial Zeŭso invitis lin. "Eventuale, probable!"

Li netrankvile brosis lian unuakvalitan malhelbluan jakon, kaj nodis kravaton, kion li aĉetis rabatite en 250 enojn por unu de mil enoj por tri ĉe antaŭ stacidomo. Li iris al la palaco triumfe kaj fiere.

"Eventuale, probable!" Li rave supozis sin sidi sur la trono kiel la reĝo de ĉiuj bestoj. "Nuna reĝo estas la leono, sed li estas maljuna. Leopardo estas malsaĝa, kaj ĉiam fieras pri la makuloj en sia haŭto. Elefanto povas gajni nenian konkludon post vanaj diskutoj. Apro estas senkonsidera. Tigro estas etspiritulo. Urso estas ekssoldato kaj militema. Do neniu havas tian kapablon sidi sur la trono kiel la reĝo de ĉiuj bestoj. Zeŭso estas certe juĝpova, ĉar li interesiĝis pri mi kaj neniu alia."

Apenaŭ la kontenta vulpo ridete supreniris ŝtuparon de la palaco, skarabo brue alflugis. Ĝi estas la ŝatata manĝaĵo de vulpo. "Brave, jen estas por vespermanĝo! Unu manĝo restas disponebla." Tio devenas de la malnobleco kaj malĝojeco de lia malriĉa naskiĝo. Li ekstaris kaj kaptis la skarabon. "Kia sukceso!" Li enŝovis ĝin en sian poŝon. Zeŭso

rigardis la tutan aferon, kaj taksis lin malalta. Kialo estas jene: lia ĉagrenemo ne povus korektiĝi eĉ se li fariĝus reĝo.

La vulpo pentis kaj bedaŭris, sed kio pasis ne revenos. Nuna mezaĝa vulpo ne faras tielan malsaĝajn aferojn. Sed pro lia juneco, li fiaskis sen pripenso pri postsekva afero. Poste li maltrafis elitvojon, kaj ekiris en branĉa fluo. Tial ĉi, li aldone havis la branĉan komplekson. Li estas fiera pro intelekto. Do, li havas malkontenton kaj malamikecon kun la mondo kiu apatie traktas lin.

La leono faris la tian vulpon disĉiplon. La Kialo estas jene: La leono ne havas iaman korpoforton kaj havas diabetemon kaj astmon. Sed li kaŝas jenajn faktojn, kaj kredigas al ĉiuj bestoj ke li ankoraŭ havas forton timata de ĉiuj. Verdire li jam ne povas gajni ĉasaĵon per iama ekscesa forto. Por li, eĉ movi korpon estas ĝene. Venas jam la jaro kiam li devas gajni lian manĝaĵon per nur cerbumi sen movi sian korpon.

Iam, li dormis en kaverno ŝajnigante malsanon. Tiam senĝenaj birdoj kaj animaletoj enrigardis lin scivoleme. Eĉ tiajn konsolantojn li manĝis disŝirante. La vulpo vizitis lin en la kaverno kaj diris,

- "Kiel vi fartas? Mi aŭdis, ke vi estas malsana."

Li respondis,

- "Apenaŭ, sed ankoraŭ ne. Ĉu vi venas konsoli min?"

- "Aha!"

- "Eniru! Hieraŭ simio venis kun sakeo por konsoli min. Ni drinku kune!"

- "Simio? Aha!"

- "Sciurino ankaŭ venis. Ŝi kunportis la rubandon de ŝelfrukto. Konsolantino estas aminda."

- "Sciurino? Aha!"

En la vulpa rideto "Aha!" estas la originaleco. La vulpo staris lontane kaj neniel proksimis al la kavernon. La leono diris

- "Kial vi ne enirus?"

- "Mi enirus, se la revenintaj piedsignoj estus ĉi tie. Sed, nur enirintaj piedsignoj ekzistas. Aha!"

- "Estas malkovriĝitaj !" Li laŭte ridegis tremante la

barbon. "Vi estas interesa ulaĉo. Proksimiĝu! Mi certe promesas al vi ne manĝi vin. Mi jam satiĝis."

- "Reĝo! Se estus malkovrita la fakto ke vi iele ŝtopas vian stomakon per proksimaĵo, oni proponos la motivaĵon pri la



malkonfido al vi.”

- “Mi komprenas. Memmovadeco tedas min senkonscie. Ne necesas diri ke ĝi estas sekreta.”

- “Bonvolu konfidi min!”

La vulpo nuligis ĉiujn piedsignojn de la viktimoj, kaj ekkonis malfortecon de la leono. Tiel li fariĝis la unua intimulo de la reĝo. Sed, li tute ne malestimis la leonon. La dignoplenaj kolhararoj flirta en vento, la akraj ungoj kaj dentegoj, harditaj flamaj okuloj, la fortaj antaŭaj piedoj kiuj povos faligi urson per eĉ unu bato, la furioza kaj mirkonsterna muĝo. Jene, la leono estas terura kvankam ĝi estas maljuna. Plie, oni ne povas distingi kiam la diktatora reĝo ŝanĝas sian koron. Se ĝi inklinus, la malforta vulpo estus facile disŝirita. Pro tio, li ĉiam prientas kaj flatas ĝin. Plie nerimarkigante gardi ĝin, li intimiĝas kun ĝi. Ĝi ĉiam favoras lin pro lia lerta rapidmovo, inĝenia parolado, kaj tre intelekto. Ne necesas diri ke li malbonuzas lian privilegion kiel leonan intimulon, kaj nutras lian poŝon. Sed li estas izoliteca. La fakto ne estas evitebla ĉar li pensas ke neniu estas saĝa krom li. Por tiu estas malfacile havi amikojn. Li ne ĉagreniĝas pri tio.

Tamen nur lupo ne hezitas deklari “mi estas la juna frato de la vulpo”. Antaŭe, la lupo celis ŝafojn pro malsato. Hundoj gardas ŝafojn, do li pensis, ke li devas unue faligi hundojn kaj provoki ilin. Li estas malpacienca kaj malmodesta. Senkonsidere, li alfrontis al hundoj. Sed, kuraĝaj hundoj mordis lin kaj deŝiris lian orelon. Li estis serioze vundita, kaj foriris de tie enmetinte la voston inter la krurojn. Estas en ĉi tiu punkto lia malsaĝeco. Liaj vundoj doloris, kaj li kapturiniĝis pro malsato. La sovaĝa lupo eĉ verŝis larmojn de la apatiaj okuloj.

Pretervoje la vulpo trovis lin, kaj interesiĝe demandis lin, “Kiel vi fartas?” La vulpo ne amikiĝas kun netaŭgulo pro lia egoisma karaktero, sed tuj kalkulis la eblecon utili iam lupan perforon kaj parolis al li. Kvazaŭ renkontiĝe kun Budho en la narako, li detale plendis al la vulpo. Ĉiutage neniu proksimiĝas al la malamata lupo. La vulpo aŭdis kaj ridis. “Vi estas malsaĝa. Estas simpla. Trompu ŝafojn! Sekrete agitu ilin kaj diru al ili <Vi estas paciencaj por diktigado, bojigado, reguligado, kaj administrigado de hundoj. Se la hundoj forigus, vi povus iri al viaj ŝataj lokoj kaj povus manĝi herbon ĝissate>. Ĉar ŝafoj estas malsaĝaj, ili tiuj aprobas vian parolon. Vi antaŭkonsiliĝas kun ili, kaj kondukas hundojn al ia krutaĵo pro faligi hundojn. Estus simpla se vi povus havi iliajn kondukojn. Rezulte, vi povus gajni ilin.” Li agis kiel la vulpo diris, kaj sukcesis. Do li povis manĝi ŝafojn ĝissate antaŭ paŝtisto forpelis lin.

Poste, li fidis la vulpon kiel maljunan fraton, kaj nomis sin la sekvanto. Arbitre li estas konvinkita, ke ili

firme kunĵuris pri sia duonfrateco. Ebrie kaj larme li prenas la vulpajn manojn kaj senfine gurdadas samajn vortojn “Bonvolu konfidi min! Por vi, mi servus eĉ en fajro aŭ akvo.”

La vulpo mokis lin sekrete en sia koro “Ju pli malsaĝa la kapo estas, des pli glueca la sango estas.” Fakte, la lupo ne povas elegante vivi kiel la vulpo, kaj estas apenaŭ manĝebla ĉiam. La vulpo ridetas pri lia maleleganteco. Nesciante la vulpan rideton, li estas adherema al la vulpo, kaj ricevas nur malgrandan dividon el la vulpa granda profito.

Fakte nun estas en grava depresio. Do, la vivado per nur perforto estas malfacila por sentalentulo aŭ senvirtulo kiel li. Plie lia perforto ne estas tiel timinda, ĉar la mondo estas civilizita. Ŝafoj fariĝis saĝaj kaj ne klinas siajn orelojn al mielaj vortoj. Hundoj neniam trompiĝas. Li ĉiam estas malsata kaj iritiĝas. Apenaŭ li povis kapti perdintan ŝafon kaj provos manĝi ĝin, ĵus la leono venis kaj diris unu vorton “Donu ĝin!” La leono hurlis kaj deprenis tion. “Aĥ, ŝtelisto!” Li pretervole kriis al la reĝo. “Ĉu vi ne estas ŝtelisto?” La reĝo rigardis lin kaj spasme movis sian barbon kiel feran draton, do li retenis la bedaŭran larmon kaj malvigle foriris de tie enmetinte sian voston inter la krurojn. Li sufokiĝis pro larmo de bedaŭro. Li diris mem “La leono estas senkompatulo. Nenial li bezonas depreni perforte de tia malaltrungulo. Mi pensas ke la mondo estas en ekstrema depresio, ĉar eĉ la reĝo faras tian aferon. Ha, mi estas malsata. Ĉu mi povas trovi eĉ akridon? Estas netolerebla imagi la bongustan verdodoran sukun, kiu venas de la mola trunko mordtranĉita.”

Liaj apatiaj okuloj sangadas. Post li baldaŭ vagas salivume kaj ŝancele, li snufis. Grupo de leporoj troviĝis en la ombro de arbo. Ĝi estis lepora kulturcentro. Ĉi tie lepora literatura kurso estis malfermita, kaj ĉirkaŭ kelkdek belaj senokupaj leporinoj ĉirkaŭbaris viran leporon, kiu estis fama mezaĝa novelisto, kaj la kursaninoj atente aŭskultis la viran kurson. Lupo estas ĝenerale malklera kaj neinstruita. Inter lupoj malofte estas intelektuloj, doktoroj aŭ advokatoj. Sed li ne vivas en la areo rilata al kulturo kaj scienco. Do li ne scias, ke kulturo estas respektinda aŭ ne. La nobla signifo de kulturcentro ne venis al eĉ lia kaprando. Estis en lia kapo nur penso almordi frandan, bone nutratan, mezaĝan leporinon. Li eniris salte en la salonon. Tuj okazis ŝirantaj inferaj vekrioj. Sed lia plano estis erara. Ordinare leporo estas rapidmova. Plie nunaj senokupaj leporinoj forĝas sin mem de teniso aŭ naĝado en la lepora ripozdomo, do ili estas tre facilmovaj. Estas la idiotismo “forkuri kiel forkuranta leporo”. Fakte, ili fuĝistiom rapidege, kiom la kruroj permesis. Li lantmove pelis ilin tien kaj ĉi tien, kaj la rezulto estis

mizera kiel la proverbo “Kiu ĉasas du leporojn, kaptas nenion”. Nur unu leporo ne povis forkuri pro perdo de la forto ĉe la kokso obsedite de teruro. Ĝi estis la vira lektoro. Li tuj alsaltis kaj raptis ĝin kun sia dentego. Ĉar ĝi estas novelisto, ĝi ne forĝas mem piedojn pro la malbona influo de ĝia hejmlaboro. Pro tio, malgraŭvole ĝi ne povis forkuri rapide. Ĝi kriis, “Ĉesu! Ĉu vi scias kiu mi estas? Mi estas fama novelisto. Se vi volas manĝi leporon, manĝu normalanon. Kial vi manĝus tian elitanon kiel min?”

Sed tragike, la lupu neniam legis novelon antaŭe. Se li irus juste al eĉ mezlernejo, li povus sciigi kia respektinda estas novelisto. Li iris nur unu tago al elementa lernejo. Troviĝis nenia metodo eviti la vojon al malfacila situacio por ĝi. Salivumante, li mordis ĝin. “Hej, momenton!” La novelista leporo kriis ĝuste por kolerigo pli ol teruro. “Kial vi manĝos min? Manĝu malsaĝan aŭ maltalentan leporon. Kial vi manĝos min, neniun alian? Mi estas kvazaŭ la lepora trezoro, kaj talentulo. Sollupo estas romantika, ĉu ne? (De tiam, senespera flataĵo aperis en ĝiaj vortoj.) Vi estas certe vera! La sollupo ne povas vivi se malforta, kaj ne havas kvalifikecon vivi se malamema. Hej s-ro lupu! Kiu estas forta pri malbono estas ankaŭ forta pri bono. Hej, manĝu ordinaran leporon se vi deziras manĝi. Kial vi pensas pri mi. Mi estas fama novelisto. Oj! Vi manĝas mian manon! Mi...ne estas...normala leporo. Mi...skribas...novel...lepo..”

Poste aŭdiĝis nur lia absorbita maĉasono. Li tute ne aŭdis ĝian vorton. “Mi jam manĝis, mi manĝis”. Kontente li foriris ŝancele de la loko fosante sian dentojn per alumeta ligneto. Li viŝis sian salivumon kaj okulmukon pro satiĝo post longa tempo, kaj falis en lian neston. Li kuŝiĝis sur la hutonoj neniam rearanĝitaj, ruktis kaj ellasis furzegon. Rigardante ridetaĉe la pornografiaĵon metitan sur kaploko, alia deziro ŝajnis ekĝermi al li. Liaj okuloj sangadis pro ekscitiĝo.

La vulpo rigardis malsupren la lupan scenon de lia loĝejo en alta monteto. Li aŭdis la kriegon de la novelista leporo ĝustatempe manĝota de la lupu. Sed, pro lia natura malvarmsangeco li ne havis penson helpi la leporon, kaj diris mem, “Hm! Eĉ se leporo skribas ian ajn novelon aŭ hontas, la leporo estas nur manĝaĵo por lupu.”

Nun, se mi devus diri, ke la vulpo havas malfortaĵon, li normale havas edzinon. La kialo estas pro tio, ke vulpa edzino samkiel homa edzino estas virino aŭ femalo. Femalo estas la gento konservi sian opinion, kiel vi scias. Mi volis skribi la vulpon kiel bravan malbonulon. Sed mi ne povas deviigi la fakton, ke li havas edzinon. Estas malfacile vivi “brave” kun edzino. Edzino diras laŭ sia opinio. Li ne povas

mistifiki per buŝo ŝin kiel la lupon, t.n. lian junan fraton. La vulpa geedzoj ambaŭ laboras.

- “Kial nur mi devas domlabori? Mi laboras tra la tuta tago. Disputante kun malsaĝa kaj malrapidema sekciestro kaj interbatalante kun ne juna oficistino servanta dum 25 jaroj, mi laboras diligente por ne esti fingromontrita al mia dorso. Kial mi devas aŭdi vian koleron pri malfrua vespermanĝo kaj zorgomanka purigo kiam mi revenis tre lace al nia hejmo? Ĉu vi havas ian vorton?”

Ŝi estis la direktoro de la oratora klubo en sia altalernejo, do estas lerteparola. Ankaŭ sia lernokariero estas pli alta ol sia edzo, do neniam ŝi subkaŝas sin. Ŝi impone debatas kun sia edzo, kaj eĉ iomete ne cedas al li.

- “Ĉar ni laboras tiel same, ni ambaŭ faru domlaboron! Ĉu vi havas ian vorton? Mi konfidas, ke mia lerneja kaj profesia rezultoj estas pli supraj ol la viraj. Do mi deziras, ke vi faras domlaboron egale kun mi.”

- “Sed vi estas virino. La domlaboro estas virina respondeco. Kvankam vi estas saĝa, vi estas virino. Vidu la leporon! Eĉ novelista aŭ normala leporo, ĉiu leporo estas leporo. Do, la leporo estis manĝata de la lupu. Post ĉio, ĉiu virino estas virino. Domlaboru virineske! Lernejoj poentaroj kaj aliaj rezultoj ne estas problemoj.”

Tio ne estis lia elokventeco, sed nur monologo.

Kvankam mi dezirus skribi pri la brava malbono de la vulpo kaj pri lia decidemo, la vulpo eniris en kuirejon laŭ la ordono de sia edzino, kaj komencis lavi rizon.

tradukis kaj sendis **Kacu MATOBA** el Japanio

Fonto : “Fabloj de Ezopo” de TANABE Seiko

Deliro **poemo de Maria Nazaré Laroca**

Kia mond' estas nia,
en fajrej' de frenezo
brulanta for de Dio!

Tial muzoj forestas,
kaj poetojn forlasas
en animo soleca...

Eĉ naturo ribelas
kontraŭ malsaĝo homa
konfuzante sezonojn!

Maria Nazaré Laroca

Juiz de Fora, 16/02/2019.

Fonto: <http://nazarelaroca.blogspot.com/2019/02/deliro.html>



Auld: Epokfara aŭtoro de la Esperanta ĉefverko

Antaŭ pli ol duona jarcento aperis ĉe la eldonejo Stafeto en Kanariaj Insuloj libro, kiu enkondukis novan periodon en la historio de la Esperanta poezio, periodon eksterromantike modernisman. Ĝia titolo Kvaropo (1952) indikis, ke temis pri verko de kvar poetoj. La plej grandan parton okupis poemoj de 26-jara skoto, William Auld. En libro eldonita en 1997 okaze de la kvindekjariĝo de lia verkado en Esperanto, Pajleroj kaj stoploj, elektitaj prozaĵoj, estas konstateble, ke liaj libroj je tiu tempopunkto atingis la nombron de kvindek. Evidente, ni havas ĉi tie verkiston de eksterordinaraj kreopovo kaj sindediĉo.



Kiam eksplodis la Dua Mondmilito William Auld estis lernanto en liceo. Tiam li havis preskaŭ 15 jarojn (naskita en 1924). Fininte la liceon, li volontule aliĝis al la brita aerarmeo kaj fariĝis ĉasaviadila piloto kaj militservis en Mez-Oriento, Nord-Afriko kaj Mediteraneo. Post la milito li daŭrigis siajn studojn en universitato kaj fariĝis magistro pri anglaj lingvo kaj literaturo kaj Eŭropa historio. Li kvalifikiĝis kiel instruisto kaj servis kiel ĉefinstruisto kaj poste kiel vicedestro de gimnazio. Dum kelkaj jaroj li estis prezidanto de Akademio de Esperanto.

La verkaro de Auld estas tiom ampleksa kaj varia, ke necesas dividi ĝin en kategoriojn por ekhavi pri ĝi supervidon. Originale Auld verkis ĉefe poemojn. Por plej multaj li estas unuavice poeto kaj la verkinto de La Infana Raso, kiun multaj konsideras la Grandverko de la ĝisnuna originala poezio en Esperanto. La plena originala poemaro de Auld – ses poemlibroj – aperis en unu volumo en 1987 sub la titolo En barko senpilota. Sed Auld estas ankaŭ elstara eseisto. Aperis de li ses esearoj, kiuj plejparte pritraktas la literaturan kulturon de Esperanto kaj la lingvon mem.

Auld estas supera tradukanto de literaturo. Liaj tradukoj estas ĉefe de grandverkoj: La sonetoj de Shakespeare, la eposo Aniaro de la sveda poeto Harry Martinson, La urbo de terura nokto de la angla poeto James Thomson, La Mastro de l' Ringoj de Tolkien kaj multaj pliaj. Kaj Auld verkis ankaŭ lernolibrojn. Tre populara estas lia Paŝoj al plena posedo, kelkfoje reeldonita.

Mi menciis komence, ke la poemlibro Kvaropo enkondukis novan periodon en nia poezio. Multaj vidis en la poezio de la kvar poetoj aperon de nova poezia

skolo, la skota skolo. Tiu nomo devenas el tio, ke tri el la poetoj: William Auld, John Francis kaj John S. Dinwoodie estas ĉiuj skotoj, la kvara poeto, Reto Rossetti, tamen estis svis-devena, sed jam longe vivis en Britio. Kontraste al la klasikaj-romantikaj influoj de la budapeŝta skolo, kies korifeo estis Kálmán Kalocsay, la poetoj de la skota skolo ekiris sur la vojo de la tiel nomata modernismo, tamen ĉiu laŭ sia persona maniero. Komuna karakterizaĵo estis distanciĝo for de la romantikismo, kiu pli-malpli regis la Esperantan poezion dum la unua duono de la lasta jarcento. Tamen ne mankas sentoj, eĉ pasio ĉe la poetoj de la skota skolo. Tiel la poemaro de Auld en Kvaropo portas la titolon Spiro de l'pasio, kiu estas citaĵo el verso de Miĥalski:

*Aspiras mi per spiro de l' pasio
elkrei novan mondon de la sonoj.*

Ĉe Auld tiu pasio aparte koncernas la lingvon mem, la junan Esperanton, kiun li konsideras la vivofonto de nova, libera poezio. En poemo titolita Rekvieto por la angla poezio Auld esprimas iom kompateme la opinion, ke la angla poezio estas morta, ke ĝi jam faris sian taskon kaj ripozu do en paco kaj li senrezerve antaŭvidas Esperanton kiel ricevanton de la torĉo de poezio en la moderna tempo:

*Daŭrigi la laboron
post vi alia venas,
kiu al la moderna medio apartenas,
kaj povas pli faksperite roli al ĝi sufloron.
La nova intendanto
sur mont' parnasa estos la juna esperanto.*

Per sia granda poemo La infana raso (1965) Auld ankoraŭ pli vastigis la poezian dimension de la juna lingvo. La 25-ĉapitra poemo estas grandskala disvolviĝo de esploroj, kritikoj, analizoj, historiaj motivoj, personaj filozofiumoj, kie la ĉeftemo estas la homa raso mem, ĝia situacio kaj evoluebloj. La homa raso estas ankoraŭ infana, sed havas eblecon kaj esperon maturiĝi, malgraŭ diversaj kontraŭdiroj, konstatablaj je ĉiu ĝia paŝo. La ŝlosilvortoj de la poemo estas kuraĝo kaj obstino:

*Kuraĝon, homo-fratoj de ĉiu haŭtkoloro –
la temp-miraĝo, kiu disigas vin damninde,
nin fine rekunigos.*

La granda poemo estas modernisma, tamen

transiras apartajn tempon kaj lokon, ĝi estas poemo de vizio, kiu meritas seriozan atenton ekster la limoj de la Esperanta literaturo.

Kiel poeto kaj verkisto William Auld havas ĉiujn kvalitojn de grandeco: abundon, varion kaj kompetenton. Li multe influis la evoluon de la Esperanta poezio dum la dua parto de la pasinta

jarcento kaj daŭre okupos altan lokon sur nia Parnaso.

de **Baldur Ragnarsson**

Artikolo verkita por la revuo Juna Amiko (#108, 2004)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/auld.html>

Stranga familio

verkis kaj sendis Pedro Fernández Rodríguez el Kubo

Fantazia rakonto de

Pedro Fernández Rodríguez el Kubo

AI: **Beatriz Quintana**



Ŝia familio estis stranga; pro tio liaj gepatroj malpermesis al li viziti ŝin, sed li malobeis ilin kaj ĉiam, kiam li povis li iris ĉe ŝi, ĉar ŝi estis la ununura virino, kiu sentigis lin tiel, kiel neniam antaŭe li sentis.

Ŝia familio ne ŝatis lin; ne pro la fakto, ke li havis la haŭton malhelan, sed ĉar li povus malkovri ilian sekreton; sekreton tre bone kaŝitan: dum multaj generacioj ili travintras samkiel kelkaj bestoj, pro tio ili vivas de antaŭ multaj, multaj jaroj. En la komenco ili dormadis en grotoj, kovritaj de foliaro; nuntempe ili travintras en fridejoj, kiuj troviĝas en ilia kelo. Ne ĉiuj samtempe; ĉiam estas almenaŭ du deĵorantoj, ĉar ili devas prizorgi la dormantojn kaj okaze, ke iu el ili ne vekiĝu ĝustatempe, la deĵorantoj povu veki ilin, por ke

ili ne transiru de la dormo al la morto.

Kaj nun tiu ĉi obstina knabino volas edziniĝi kaj rifuzas travintri kvankam jam estas ŝia vico. Se ŝi edziniĝus, eble dum la mielmonato ŝi rakontos al li la sekreton. Dekomence li ne kredus, sed poste li dubus kaj pli poste li komencus dedukti: neniam li vidis la kvin familianojn kune; dum kelkaj monatoj malĉeestis almenaŭ du kaj se li irus en la kelon kaj vidus la tri fridejojn, ĉiu el ili kun lito ene, certe li suspektus.

Do, la patrino donis al ŝi dormigilon kaj diris al li, ke ŝi iris flegi familianon en alian urbon, sed baldaŭ li malkovros la mensogon.

La patrino, la patro kaj la avino malsupreniris en la kelon kaj haltis fronte al la fridejo, kie ŝi travintras. La patrino ne sciis kion fari, ankaŭ ne la patro. La avino, pli praktika, malŝaltis la kurenton.



verkis kaj sendis **Pedro Fernández Rodríguez el Kubo**



11 >> aliĝilo (<https://uea.org/alighoj/alighilo>), se vi ne jam estas membro. Membriĝo en UEA estas esence la plej baza maniero subteni la agadon por Esperanto kaj por la Asocio.

"Eventa Servo estas tio, kion mi atendas de monda organizo", substrekis la Prezidanto de UEA, Mark Fettes, dum la laboroj pri la akiro de la servo. La kreinto de ES, Fernando Ŝajani, deklaris, ke li "komprenas Esperanton kiel ilon por pacigi kaj interfratigi la homaron" kaj "esperas, ke per UEA Eventa Servo povas kreskigi la Esperantan movadon monde, kun ama, paca kaj frateca sento".

La 50-a Malferma Tago de UEA (<https://eventaservo.org/eventoj/kBr2GFu9wWrKFWxU>) samkiel la 104-a Universala Kongreso (<https://eventaservo.org/eventoj/eP4qn7QICYuyLysl>) jam estas en Eventa Servo. UEA instigas ĉiujn Esperantistojn registriĝi en la retejo (https://eventaservo.org/users/sign_up) kaj disvastigi siajn eventojn.

Fonto: <https://uea.org/aktuale/komunikoj/2019/Eventa-Servo-farigas-nova-servo-de-UEA>

1907: la Ido-Skismo

En 1907 Esperanto devis fronti skismon pro la apero de Ido, planita lingvo kreita de la francoj Louis Couturat (1868 - 1914) kaj Louis de Beaufront (1855-1935) surbaze de provo pri reformo de la Zamenhofa lingvo.

Couturat estis filozofo, matematikisto kaj lingvisto kaj post la apero de Ido unu el la ĉefaj kontraŭuloj al Esperanto. De Beaufront siavice estis lingvisto kaj eminenta pioniro de Esperanto. La unua fondis en 1901 Delegacion por Alpreno de Lingvo Internacia, kies celo estis peti de la Internacia Asocio de Akademioj (1900) elekton de internacia lingvo aŭ laŭnecese starigo de propra komisiono tiucele.

El tiu ideo rezultis kreo de komisiono kiu kunvenis diversfoje en Parizo en 1907 kaj de Beaufront estis la esperantisto komisiita de Zamenhof por defendi Esperanton antaŭ aliaj proponoj. Malfeliĉe en koluzio kun Couturat, la franco anstataŭ fari tion, decidis agi favore al la projekto pri Ido, iu reformata Esperanto. La E-Movado kiel tuto neis ian ajn modifon en la lingvo. Laŭ Enciklopedio de Esperanto, 20% da E- gvidantoj kaj nur 3-4% el la tuta esperantistaro forlasis E-on favore al Ido. Ĝis 1910 el 307 societoj nur 14 aprobis ĝin. Tia komisiono, alie kun malmulte da lingvistoj partoprenantaj kaj malregulaĵoj, kiel ekzemple la kritikinda partopreno de Couturat kiel voĉdonanto (li estis aŭtoro de unu el la ekzamenataj projektoj – Ido...) en la fino rezignis pri iu ajn elekto.

Sed malgraŭ la iam akra polemiko inter la du lingvokomunumoj, Esperanto laŭ kelkaj profitis el impulsoj, kiujn donis Ido. Precipe en la literatura lingvo enuziĝis konsiderinda nombro da sinonimoj de pezaj morfem-kombinaĵoj, kies neoportunecon oni ekkonis en la praktiko, kiel konstatis Detlev Blanke en sia verko *Internationale Plansprachen*.” ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Ido_\(lingvo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Ido_(lingvo)))

La propra Ido suferis serion da reformoj kiuj malfortigis ĝin pli kaj pli tra la tempo. Ido nuntempe havas nur inter 100 kaj 200 adeptojn precipe en Germanio, Francio kaj Hispanio, kompreneble sen nenia perspektivo iam esti agnoskita kiel solvo por la problemo da la internacia komunikado.

Zamenhof, okaze de sia salutparolado en la 4a Universala Kongreso en Dresdeno, Germanio (1908), malrekte aludis al la okazintaĵo pere de kelkaj alineoj. La unua parte jenas:

Karaj samideanoj! – En la daŭro de la lasta jaro en nia afero okazis faktoj, kiuj maltrankviligis por iom da



verkis César Dornoles el Brazilo

tempo la mondon esperantistan. Nun ĉio jam denove trankviliĝis. Nia arbo, pri kiu mi parolis en Kembriĝo, en la pasita jaro, plej konvinke montris sian tutan fortecon kaj sanecon, ĉar malgraŭ la tu, te neatenditaj atakoj, kiuj en la daŭro de kelka tempo kaŭzis grandan krakadon, la arbo konservis sian tutan potencon kaj perdis nur tre malmultajn foliojn. Malgraŭ la kaŝite preparitaj kaj rapide plenumitaj atakoj, kiuj ne donis al niaj soldatoj la povon dece orientiĝi kaj interkomunikiĝi, ĉiu el ili sur sia aparta loko staris forte kontraŭ ĉiuj forlogoj, kaj nur tre malmultaj lasis sin kapti per lertaj vortoj. (C.D.S)



Patro Nia en Ido

*Patro nia, qua esas en la cielo,
Tua nomo santigesez;
Tua regno advenez;
Tua volo facesez
Quale en la cielo, tale anke sur la tero.
Donez a ni cadie l'omnadia pano,
E pardonez a ni nia ofensi,
Quale anke ni pardonas A nia ofensanti,
E ne duktez ni aden la tento,
Ma liberigez ni del malajo.
Amen*

Patro Nia en Esperanto

*Patro Nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu via nomo.
Venu via Regno.
Fariĝu via volo,
kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ
kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
Amen*

Fontoj:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Ido_\(lingvo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Ido_(lingvo))

<https://es.wikipedia.org/wiki/Ido>

> Teksto originale publikigita en la gazeteto Gaja Haveno n-ro 39, januaro-februaro 2019 (Porto Alegre)

verkis **César Dornoles** el Brazilo

fonto: <https://cesardornoles2.blogspot.com/2019/03/1907-la-ido-skismo.html>



Fermi-paradokso

Nomite pro fizikisto Enrico Fermi, la Fermi-paradokso notas problemon en nia kompreno de la universo.



Nia universo estas treege malnova. Ĝi havas 13,8 miliardojn da jaroj. Nia planedo havas nur 4,5 miliardojn. Multaj steloj estas similaj al la suno sed estas pli malnovaj. Se kelkaj el tiaj steloj havas planedojn kiel nia Tero, kelkaj el tiuj eble enhavas vivon. Se tiu vivo iam atingus nian nivelon de inteligenteco, tiuj estaĵoj povus havi centojn da milionoj jaroj dum ili povus fariĝi eĉ pli teknologia ol ni.

Kvankam nia universo estas granda, se nur unu alia civilizacio ekzistus ie en nia galaksio, kiu kapablus vojaĝi al aliaj steloj je rapido de 10 procento de la lumrapido, tiu civilizacio povus vojaĝi tra la tutan galaksion dum miliono da jaroj. Se la civilizacio havus

verkis Jason Mey el Usono

100 milionojn da jaroj, tiu tempo ne estus tre longa. Se tiu civilizacio ekzistus, la civilizacio povus preni ĉiun planedon kaj stelon en la tuta galaksio antaŭ ol iu alia eĉ ekzistus.


Tial Enrico Fermi demandis, dum neformala intervjuo, "Kie estas ĉiuj?"

Ĉu la Fermi-paradokso eĉ estas paradokso estas diskutbla. Ni scias malpli pri nia universo kaj preskaŭ nenion pri la ekstertera vivo. La paradokso en ĝi ne estas pri problemo de la universo sed pri la fakto, ke unu el niaj bazaj supozoj pri la universo devas esti malĝusta. Ni kredas ke ni havas oftan planedon kun ofta vivo en ofta galaksio. Eble tio ne estas la okazo.

Ĉu nia tipo de planedo estas tre malofta? Ĉu homa inteligenteco estas tre malofta? Ĉu vojaĝi al aliaj steloj estas neeble? Ĉu ni iel ne rimarkas aliajn civilizaciojn rekte sub niaj nazoj? Ĉu civilizacioj ĉiam detruas sin antaŭ ol eliri el sia planedo?

En universo tiom malnova kaj tiom granda, ĉu homaro povus esti sola?

verkis **Jason Mey** el Usono



Fonto: el la blogo Pri lo Ajn - Blogo de variaj temoj <https://priioajn.wordpress.com/2019/01/08/fermi-paradokso/>

Plie pri Mez-Orienta Kunveno

Kie en okcidentaj landoj oni trovas landan asocion, kiu aĉetas sian sidejon en la centro de la ĉefurbo, kiel ĵus faris la irana landa asocio de UEA? Kie oni trovas instruadon de Esperanto al universitataj studentoj en la kadro de la plej prestiĝa universitato en la ĉefurbo kaj en aliaj universitatoj de la lando? Kie oni trovas gejunulojn, kiuj senprobleme kunlaboras kun la pli aĝaj esperantistoj kiel egaluloj?



La respondojn al tiuj demandoj oni malkovris dum la 12-a Mez-Orienta Kunveno de la 28-a ĝis la 31-a de marto. En plaĉe antikva konstruaĵo en la urbo de tapiŝoj kaj kaheloj, Kaŝano, oni aŭskultis serion da prelegoj pri la stato de la movado en Irano kaj en aliaj mez-aziaj landoj. Mi estis trafita de la kvanto de agadoj kaj eldonaĵoj de la irana movado. Ĝi havas grupojn en ĉiuj gravaj urboj, kaj tre aktive sentas

verkis Renato Corsetti el Italujo

respondecon pri ili.

Alia interesa fakto pri la irana movado estas ĝia seninterrompa ekzisto tra ĉiuj politikaj ŝtormoj de la pasinta jarcento. Ni ankaŭ aŭdis raportojn pri la stato de Esperanto en Uzbekujo, Taĝikujo kaj aliaj mez-aziaj landoj, Estis interŝanĝitaj planoj pri komunaj agadoj en Meza Azio. Pro la ĉeesto de Mireille Grosjean, prezidantino de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), ni aŭdis pri problemoj en la okcidento, ekzemple kiel funkcias la nova kotiz-sistemo de UEA en lando, el kiu oni ne rajtas sendi monon eksterlanden pro internaciaj malpermesoj.

Tio estis la plej granda Mezorianta Kunveno de la lastaj jaroj. Venis partoprenantoj el Belgujo, Britujo, Francujo, Germanujo, Rumanujo, Rusujo, Svislando kaj Taĝikujo.



Dum la kunveno okazis ankaŭ AMo-Seminario (Aktivula Maturigo). La plej konkretaj rezultoj de tiu seminario verŝajne estos plifirmigo de kontaktoj kaj agadoj en Meza Azio kaj la entuziasmigo de iranaj samideanoj. Multaj el tiuj lokaj esperantistoj la unuan fojon spertis internacian kunvenon en sia lando. Por ili tiu sperto estis simila al la sperto de la kongresanoj ĉe

la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-maro.

Renato Corsetti

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/plie-pri-la-mez-orienta-kunveno/>

La Martelistoj

-- kritika kaj amuza rakonto de Thierry Salomon

PASINTSEMAJNE MI HAVIS STRANGAN PREMSONĜON. Tiel estis ke en la mondo por enbati najlon oni uzis ŝtonojn ĉar ne estis konata alia metodo.



Tamen antaŭ multaj jaroj iu jam elpensis la martelon. Sed nur malmultaj sciis pri tio. Tiuj malmultaj, kiuj apogis tiun elpenŝaĵon nomis

sin la "martelistoj". Ili organiziĝis en kluboj kaj asocioj. Ili portis insignon sur la brusto: etan martelon. Bedaŭrinde anstataŭ uzi sian martelon en la praktiko kaj tiel per la ekzemplo konvinki la aliajn pri ĝia utileco, ili senĉese disputis aŭ diskutis pri negravaĵoj. Dum la tuta tempo ili paroladis inter si pri tio, kiom bona estas iliaj marteloj, sed neniam uzis ilin por praktikaj celoj en la vera vivo. Eĉ ne malmultaj aldonis ŝanĝojn al sia martelo por ke ĝi estu pli ronda kaj pli simila al aspekto de ŝtono.

La plej granda martelista asocio estis Tutgalaksia Martelo-Asocio, kiu eldonis la revuon "Martelo". Unufoje jare sub ĝia organizo kuniĝis la ĉefaj martelistoj en ĉiam alia urbo de la mondo. Tie sur la podio malantaŭ longa tablo sidiĝis la organizestroj sub la grandega flago de la martelistoj kun granda martelo en la supra maldekstra angulo. Martelistoj el ĉiuj landoj venis sur la podion kaj unu post la alia per granda martelbato salutis la ĉeestantojn, venintajn el la tuta mondo. Ofte plurmil martelistoj partoprenis en tiu jara Tutgalaksia kunvenego. Sed ĝia efiko por diskonigi la avantaĝojn de martelo en la socio estis preskaŭ nulo eĉ se partoprenintus dekmiloj da personoj. Tamen de la martelistoj ĝi postulis monon pro la kotizo kaj ankaŭ energion. Granda parto de la energio de la Tutgalaksia Martelo-Asocio foruziĝis por la preparo de la kunvenego. Komence de la historio de martelo la unuaj pioniroj uzis ĝin en la praktiko sed poste ĉar la martelistoj uzis sian tempon kaj financajn rimedojn por organizi aŭ partopreni tiajn kunvenegojn kaj eldoni diversajn gazetetojn pri martelaj temoj, restis nek forto nek mono por uzi tiun ilon en la vera

vivo. Pro tio la socio ne povis vidi kiel bone funkcias martelo kaj sekvi ilian ekzemplon. La ceteraj homoj ĝenerale konsideris la martelistojn kiel frenezuloj verŝajne pro la strangaj ritoj. Ofta argumento kontraŭ martelo estis ke ĝi estas artefaritaĵo kontraŭe al la ŝtonoj, kiuj estas naturaj.



Pro la rutino kaj la nekompreneo la martelistoj pli kaj pli izoliĝis de la socio. Forgesintaj la komencan celon ili ne plu laboris por uzo de marteloj en la ekstera mondo. Uzolibroj pri martelado ne estis aĉeteblaj en normalaj vendejoj sed nur en lokoj apartenantaj al la martelista strukturo. Ofte ili nomis la martelon "nia ilo", forgesinte ke ĝi ne apartenas al ili sed estis destinata al la tuta homaro. Ili ne uzis ĝin por enbati najlojn, sed okupiĝi pri martelo fariĝis celo en si mem. Multaj el ili eĉ konsideris, ke martelo estas tro nobla ilo por malpurigi ĝin per praktika uzo. Persono, kiu sekvis tiajn ritojn kaj okupiĝis pri tiaj frivolaĵoj estis nomata "bona martelista". Se iu provis instrui aŭ vendi servojn rilatantajn al la avantaĝoj de martelo li estis nomata "fikomercisto". Kaj ĉiam estis kiuj ĉizis kaj aldonis ornamaĵojn al sia martelo kaj pro tio ĝi fariĝis ne plu uzebla.

La martelistoj konsideris ke ili formas komunumon. Ili eĉ nomis ĝin Martelio. Tiu virtuala "lando" havis krom la jam menciita flago ankaŭ himnon kies rekantaĵo estis:

vivu martel'

vivu martel'

vivu la sankt' martel'

Tute ŝvitite mi vekiĝis. Ĝoje mi konsciiĝis ke tio estis nur premsonĝo. La vekhorloĝo jam indikis la 8an horon. Do mi rapide prepariĝis por partopreni la sabatan kunvenon de la esperanto-klubo...

Thierry Salomon

2005 ISBN 963 218 213 8

El: "La planedo de la senfelaj simioj kaj aliaj rakontoj"

Fonto: Internacia Esperanto-Instituto

<https://www.facebook.com/EesperantoInstituto/posts/961922977329691>

Ĉiufoje kiam tiu eta lernanto pasas antaŭ la templo, la ŝtona statuo de la Genio haste ekstaras.

- Tio estas signo, ke mia filo fariĝos granda mandareno, ĝoje pensas la patro. La vilaĝa Genio mem ne aŭdacas resti sida antaŭ li.

Ho ve! kreskante, la eta mallaboremulo fariĝas neniu alia, ol perfekta ŝtelisto. La kolera patro venas riproĉi la Genion:

- Kruela Genio! Vi skandale trompis min.
- Ĉu vere? demandas la atakato.

- Kial vi ekstaris, ĉiufoje kiam pasis mia juna kanajlo? Tio igis min pensi, ke li havos baldaŭ altan destinon!

- Kia eraro! Ekridas la antaŭzorgema Genio. Mi simple timis, ke li ŝtelus miajn babuŝojn!

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/eraro-en-interpretado/>

Vortareto

babuŝo - speco de pantoflo sen postaĵo kaj kalkanumo.

kanajlo - senhonora homo, kun malnoblaj instinktoj.

mandareno - unu el la Ĉinoj, kiuj post ekzameniĝo apartenis al unu el la 9 klasoj de la ŝtatfunkciuloj.

ŝteli - kontraŭjure forpreni kaj proprigi al si posedaĵojn de alia persono.

trompi - (iu iun) intence erarigi por sia profito aŭ pro pura malico.

5 >> ludis ĝin mem. Mi titoligis ĝin:

“*Sinemaŝk (Sinem-Aŝk). Fanny Ardant’a Mektuplar.*”
kiu signifas :

“*Amo de Kinejo (Amo en mia koro). Leteroj al Fanny Ardant.*”

Naskita en 1949, vi hodiaŭ havas 70 jarojn. La teatra kaj kineja vivo, kiujn vi komencis en la aĝo de 25, jam atingis 45 jarojn. Ekde tiam, virino sata je aplaŭdoj, amoj, sukcesoj, malsukcesoj, seniluziigoj kaj famo, mi pensas ke vi ne miros je platona amo al vi mem. Kiu scias, kiuj kaj kiom da komplimentoj oni faris al vi, s-ino Ardant. Kaj vi eble satiĝis je laŭdoj, kaj glorigoj. Famo estas fakte kaĝo en kiu homoj kaptiĝas. La publiko volas vidi vin kiel imago, kiun ili ĉiam adoras. Tamen, resti en ununura muldilo estas kontraŭ la naturo de la aktora vivo.

En intervjuo, vi diris, ke vi sonĝis entrepreni malgrandan frizejon en Italio. Ĉu por eviti famon, kaj troviĝi inter ordinaraj homoj? Eble. Vi simpatias italojn.

Vi estas varmasanga mediteraneanino.

Mi volis verki filmskripton titolitan “Bonsoir Madame” kaj dediĉi ĝin al vi. Iu simpla aktoro el Turkio enamiĝas al vi, kaj daŭre gratas vian pardonon... ktp ktp... Sed iel mi ne sukcesis kompletigi ĝin. Mi ne povis fini la skripton, same kiel mi ankaŭ ne povis plenumi multajn aferojn en mia vivo.

Mi imagas la filmojn, kiujn mi spektis kun mia patro kaj

patrino ekde mia infanaĝo en la ombro de via rideto. Mi imagas pri via profila silueto sur la blanka ekrano. Ĝi ridetas. Mi rememoras nun pri mia nigra profilo eltondita el nigra papero fare de iu strat-artistino en Montmartre, en la jaro 1995.

Rigardu, mi ankaŭ ne povas kompletigi ĉi tiun artikolon, s-ino Ardant. Miaj revoj pri Parizo, kinoteko kaj la arto de kinejo fulmrapidas. Ili estas pli rapidaj ol miaj fingroj tajpantaj sur ĉi tiu klavaro.

Se mi vivus amaferon kun vi, eble la fajro inter mi estingiĝus. Sed mi devas konservi ĉi tiun platonan imagon. Vi estas mortemulo, ĝuste tiel, kiel mi kaj ĉiuj aliaj. Vi maljuniĝas. Mi diru, ke laŭ mi vi ne faris iun ajn estetikan operacion al vi. Ĉi tiu estas konduto, kiu konvenas al via sincera kaj natura karaktero.

Jes, Fanny Ardant, eĉ se vi fariĝos 80-jaraĝa, vi ĉiam estos por mi tiu malĝoja, amara, varma, amanta, 40-jara virino, kun la dolĉa kaj simpatia rideto, kiun vi portretis en la filmo “La virino apude”. Mi ne ŝatis vian hararon kolorigitan flave. Sed tiu ankaŭ estis vi. Kaj, ĉu mi estas tiel malpia por ke mi forlasu mian Diinon?

Mi ne povas fini mian artikolon... Mi scivolemas, ĉu eble iun tagon, kiam mi spektos vin sur la ekrano, vi eliros el la ekrano, same al tiu karaktero en la filmo “La Purpura Rozo de Kairo” kaj venos al la halo kaj sidos apud mi?

Ĉu ĉi tiu admirado de mi finiĝos? Ne!

En la ombro de via rideto, mi ĉirkaŭprenas ĉiujn miajn plej ŝatatajn amor-filmojn kaj la imagon de vi, kiun mi reproduktas en mia interna mondo.

Ĉu ni iam denove renkontiĝos, mi dirus al vi esperante: “Bonan vesperon s-ino!”

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**, el Turkujo



Esperanta Enciklopedio

Por movado ĝenerale kaj por instruistoj speciale gravas la nove kreskanta reta enciklopedio VIKIPEDIO <http://eo.wikipedia.com>

Tien devus kontribui ĉefe instruistoj kaj utiligi ĝin ankaŭ por instruado kaj movigo de lernantoj. Posedi en la reto esperantlingvan informojn pri ĉiuj imageblaj temoj gravas por utiligo de la internacia lingvo, sekve ankaŭ kiel pruvo pri ĝia utileco. Ekde novembro 2002 aperis pli ol du mil artikoloj, kiujn oni eblas utiligi ankaŭ dum instruado.

En Vikipedion oni povas skribi ne nur pri ILEI kaj aliaj esperantaj organizoj kaj eminentuloj, sed ankaŭ pri ĉiuj landoj, iliaj urboj, historioj, vidindaĵoj, artistoj, sciencistoj, bestoj, plantoj, pri ĉio, pri kio kutime informas enciklopedioj.

Vikipedio jam ekzistas en 26 lingvoj, la plej riĉa estas la angla (pr. 30 mil artikoloj), sed la nia povas ĝin baldaŭ atingi.

ILEI devus speciale prilabori pedagogiajn temojn (mi kontribuis per artikolo pri Komenio), tiel finfine kolekti ankaŭ la pedagogian terminaron (kvankam el enciklopedia, ne terminara vidpunkto), kaj ankaŭ pri aliaj temoj (geografiaj, botanikaj, kulturaj k.s.) estus plej taŭgaj kontribuantoj la instruistoj.

En la hejmapaĝo vi trovos konsilojn „Kiel krei paĝon“ kaj „Kiel redakti paĝon“.

Miroslav Malovec

STARTO organo de ĈEA n-ro 238.

rete: malovec@volny.cz

Esperanto Noblat JR.

Iam en la okdekaj jaroj mi konis homon, kiu nomiĝis „Esperanto“ (antaŭnomo).

Mi estis parkumata mian aŭtomobilon kaj mi perceptis, ke iu taksio haltis proksime al mia veturilo. El ĝi eliris ŝoforo, kiu sin direktis al mi. Estis vintre kaj la loko estis iom malluma. Mi timis, sed la homo tuj trankviligis min dirante, ke li ne volas rabi min. Kaj li tuj demandis min: „Ĉu vi nomiĝas Esperanto?“ Kaj mi respondis: „Tute ne! Mi estas instruisto de Esperanto! Kial vi demandas tion de mi?“ Kaj li respondis: „Ĉar mi mem nomiĝas Esperanto Noblat Jr., filo de Esperanto Noblat.“

Mi demandis: „Ĉu vi estas esperantisto?“ kaj la homo respondis: „Ne!“ (Fakte li estis simpla homo kaj tutcerte ne interesiĝis pri lernado de lingvoj.)

„Sed kial vi nomiĝas Esperanto?“

Kaj li aldonis: „Mia avo elektis tiun nomon por mia patro kaj li ŝatis ĝin kaj ankaŭ nomis min Esperanto. Mi decidis alproksimiĝi al vi, ĉar mi vidis sur malantaŭa glaco de via aŭtomobilo tiu gluafiŝon "ESPERANTO – Lingvo Internacia" kaj mi pensis, ke vi ankaŭ nomiĝas Esperanto.“

Tia estis tago, kiam mi ekkonis homon, kiu fakte nomiĝis Esperanto.

Alisio Sartrato

El Brazilo Esperantisto decembro 2000

Eventoj n.ro 213



Lingvaj strangaĵoj en internacia medio, kiujn mi spertis inter samlingvanoj.

Pluvegis kaj estis malagrabra veteraĉo, pri kiu ni ĉeĥoj diras, ke falas unuradaj ĉaretoj. Sed franco, kiu staris kun mi sub arkado ne konis tion. Li diris, ke falas hundoj kaj katoj.

Ĉeĥoj diras, ke la poto havas orelojn. Aliaj nacioj pri tio tre miris kaj ridis, kiam tion de mi aŭdis. Ili diris, ke potoj havas tenilojn.

En Pollando dum promeno mi diris: Jen, tilio! Nia nacia arbo, ĉeĥe „lípa“. Polo kun surprizo diris: -lipa signifas ion tute senvalora en pola lingvo! Ni iris plu kaj ni vidis tabak-vendejeton kun surskriboj: PRASA, ZAPRASANY. Sed mi ne diris, ke en ĉeĥa temas pri malpura porko. Poloj estas ĝentilaj kaj kisas al virinoj manon publike, io ĉe ni tute nekonata, neebla.

En Ruslando mi pensis, ke mi regas sufiĉe bone la rusan, ĉar mi lernis ĝin en lernejo pli ol sep jaroj. Tamen, de amikoj mi eksciis, ke ĉeĥoj ofte ŝanĝas la vortojn „skribi“ kaj „pisi“, uzante mise en rusa lingvo akcenton ĉe vorto „писать“.

Ĉeĥoj transpenis multajn vortojn de germana lingvo, precipe por esprimi sin sakre dum kolero: Hergot! (germane: Sinjoro dio!), Krucifix! (ger.: Krucio kun kruciumita Kristo!), Sakra! (ger.: Svatý!)... Ili nur malfacile trovas konvenan vorton el la ĉeĥa por sakri pli elegante.

J. Drahotová

Solvo de la krucvortoenigma

KRIPTA FRAZO

Kiu amas honoron, amu laboron

